

# HUNGARA VIVO

**1**  

---

1974  
8,— Ft



**AGIP**



**MOTOROLEOJ**

**TION PETU**

**KIAM VI ȘANGÂS OLEON**

**AGIP**



**A'FOR**  
BENZIN-OLAJ

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio  
1368. Budapest, Kenyérmező u. 6.  
Aperas dumonate  
XIV. jaro, 1974. 1-a numero

## Numero pri la originala Esperanto-prozo

### ENHAVO

W. Auld: Esperantaj romanoj	2
Lajos Tárkony: Portreto	4
K. Kalocsay: La Esperanta novelo	5
Alvoko	6
V. Benczik: Gravega kultura evento	7
V. Benczik: La proza stilo en Esperanto	8
J. Szekeres: Panoramo	10
J. Mátéffy: Esztergom 1000-jara	12
L. Reith: Pri „Eszperantó Magazin”	14
Gyula Fekete: Gepatra lingvo de la egalrajteco	15
József Lengyel: Kolomboj. Tr: Éva kaj Bernard Golden	16
Mihály Csokonai Vitéz: Poemoj	17
Tr. K. Kalocsay	17
Ferenc László: Ĉirkaŭaĵo-protekto kaj akvomastromado en Hungario	18
L. Lesznai: Pri la mondfamo de la hungaraj ĥoroj	21
A. Pechan: Géza Bárczi jubileas	22
Milán Füst: Maljuneco —	22
Tr. K. Kalocsay	23
Miklós Gábor: Per plumo	26
Ekzameno sen risko	27
Korespondi deziras	27
L. Tárkony: Revuo de revuoj	28
Humuro	29
P. Avar—Mária Rózsa Szabó: Pri la virina egalrajteco	30
FERI: Esperanta prozo — krucvortenigmo	31
Sur la titolpaĝo: <i>Patrineco</i> — Okaze de la internacia virina tago: 8-a marto.	
Foto de János Eifert.	

## Por la bono de la esperanta literaturo

Kiel jam anoncote, ekde nun la Redakcio de Hungara Vivo dediĉos ĉiun duan numeron de la revuo al iu aspekto de nia originala kulturo. Unue ni provos fari ĝeneralan trarigardon pri la tri grandaj ĝenrogrupoj de la originala literaturo.

Ne estas nura kaprico, ke ni komencas per la prozo. „La maturecon de ĉiu nacia literaturo pruvas la altnivela kultivado, la kvalita kaj kvanta domino de la prozo” — skribis ie la konata hungara verkisto Ferenc SÁNTA, kies kroniko-romano Dudek horoj legeblas ankaŭ esperante. Ni pensas, ke tiu konstato estas valida ne nur koncerne la naciajn literaturojn.

Dum la lastaj okdek-ses jaroj la Movado produktis relative alt-nivelan poezion, sed nia originala prozo daŭre lamas, eĉ, oni povas observi certajn signojn de regreso. Tiu ĉi „subevoluinteco” havas nekontesteble multajn fortajn objektivajn kialojn, plejparte sociologiajn, t.e. movadajn. Nia movado ankoraŭ ne kapablas krei ĵinancajn cirkonstancojn, en kiuj povas naskiĝi veraj artverkoj.

Tamen, la supraj kaŭzoj motivas nur la stagnadon kaj regreson de la romano. Sed nia kultura vivo ankoraŭ manifestiĝas unuavice per la gazetaro, kaj tiu ĉi cirkonstanco povus krei tre favoran situacion por la evoluo de la alia proza ĝenro, la novelo. La kondicionalo ne estas senbaza, ĉar tiu favora cirkonstanco fakte ne ekzistas. La plimulto de niaj revuoj estas plena per amaso de seninteresaj movadaj raportaĵoj, aŭ per palaj tradukoj de plej ofte mezkvalitaj nacilingvaj verkoj. La originalan literaturon reprezentas maksimume nur „poemoj” de triarangaj versfaristoj, grave postrestantaj al la nivelo, jam establiginta en nia poezio. Sendube prozo postulas pli da spaco, tamen, foroferante nur parton de la kutimaj plataĵoj, preskaŭ ĉiu nia revuo povus publikigi ĉiunumere originalan novelon.

La nuna situacio estas apenaŭ entuziasmiga por niaj prozistoj, ja eĉ la premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj aperas nur sporade. Ĉu en pli ol cent revuoj ne troviĝas spaco sufiĉa por la tri plej bonaj noveloj de la jaro? Apenaŭ kredeble. Pli versaĵne kulpas ĉi-teme la neglektemo aŭ la tempomanko (aŭ la du kaŭzoj kune) de la redaktoroj. Ĉiuj scias, ke la plimulto de ili laboras sen ajna salajro; tamen: ili akceptis propravole fariĝi kolonoj de nia kulturo, do kompreneble ili devas teni la necesan ŝarĝon. Ne eblas nur atendi senpete alsenditajn manuskriptojn — tiajn cetere alsendas plejparte diletantoj —, oni devus bombardi per petleteroj almenaŭ tiun dekduon da originalaj verkistoj, kiuj kapablas verki prozon de kontentiga nivelo. Tia sinteno de la gazetaro certe efikus stimule al la verkemo de la aŭtoroj. Por fariĝi bona novelisto, oni devas verki unu novelon ĉiusemajne — asertas kun ioma troigo la usona verkisto Bradbury. Lia eldiro enhavas veron nekontesteban: bonan prozon oni naskos nur verkante. Kaj kiu volas verki por la tirkestoj? Neniu. Se ni kondamnas je silento eĉ la ekzistantajn verkistojn, baldaŭ nia prozo formortos.

Nia literaturo bezonas atenton. Ne nur la atenton de la legantoj, sed ankaŭ la atenton de la kompententaj instancoj de la Movado, antaŭ ĉio la atenton de la redaktoroj de la revuoj. Dediĉante tiun ĉi numeron al la problemaro de nia originala prozo, Hungara Vivo deziras kontribui al la veko de tiu atento.

Redakcio

William Auld:

# ESPERANTAJ ROMANOJ

Laŭ PIV, romano estas „literatura eposa proza verko, konsistanta el longa rakonto pri image elpensitaj aŭ aranĝitaj faktoj”. Ĝi estas pli longa ol novelo, sed la limo inter la du artformoj ne estas klare difinita. Eble la ŝlosila vorto estas „eposa”. Ĉiokaze, mi arbitre prenas kiel principon: „romano ne povas esti malpli ol 100-paĝa”.

Pri la unuaj romanoj en Esperanto tamen ne povas esti tiurilate dubo: ili estis vere longaj. Verkis ilin la franco Henri VALLIENNE, kaj ili estis *Kastelo de Prelongo* (1907) kaj *Ĉu li?* (1908). Ili certe ne estis grandaj artverkoj, sed apartenas al la kategorio de felietonaj sensaciaĵoj: „krimoj, incendio, misteroj, nobelino senvirigita” unuflanke, kaj „ident-konfuzoj pro ĝemela simileco, forkuroj, juĝista eraro, duobla kaj paradokse senkulpa adulto” aliflanke. Tamen Vallienne sciis sufiĉe bone teni la intereson per tiuj iom nekredindaj okazaĵoj; krome li tiklis la erotikon per relative malkaŝaj aludoj al amoraj okazaĵoj. Lian stilon oni siatempe akre kritikis, kaj, kvankam kun la paso de la tempo multaj el la kritikitaj detaloj ŝajnas malpli kritikindaj, ni devas konfesi, ke bedaŭrinde lia stilo ja ne estas modela. Kalocsay siatempe reviziis lingve la romanon *Ĉu li?*, sed nur la unua parto de tiu reviziaĵo aperis, ĉe „Literatura Mondo”.

Tute aliaj estas la verkoj de nia dua romanverkisto Heinrich August LUYKEN (angliĝinta germano), kiu estis evangelia kristano kaj verkis kvar romanojn forte spegulantajn tiun ideologion: *Paŭlo Debenham* (1912); *Mirinda amo* (1913); *Stranga heredaĵo* (1922); *Pro Iŝtar* (1924). En ĉiu el ili, ies simpla kristana kredo venkas herezaĵojn kaj religiajn dubojn; kvankam tiu fakto iom limigas la profundecon de la rolantoj, tamen la intrigaj okazaĵoj sukcesas teni la intereson — kondiĉe, ke oni volonte toleras la eksmodecon ne nur de la konceptaro, sed ankaŭ de la formo mem de la romanoj, kiu impresas senteble (sed ne klasike) praepoka. Pli aktuala ol la ceteraj restas *Pro Iŝtar*, historia romano en la kadro de la antikva Babilono, kie la religiaj ideoj de la aŭtoro sidas pli hejmece: rolas interalie la biblia figuro Ijob.

Verŝajne ne tre mirinde, montriĝis inter esperantistaj aŭtoroj forta emo al tio, kion mi riskas nomi *utopiismo*: per tio mi volas diri, ke oni plurfoje sentis emon perromane prezenti sociajn kritikojn aŭ filozofiojn. Tia emo, kompreneble, povas prezentiĝi diversmaniere; la *utopiismo* ĝenerale prezentas ian fantazian socion, en kiu aŭ oni vivas laŭ iaj utopiaj moroj reprezentantaj la perfektecon, aŭ oni vivas *laŭ ties malo* (kaj tiukaze la aŭtoro transiras al la *satiro*). Ambaŭ specoj ekzistas en Esperanto. La plej frua tia verko estis *Nova sento* (1915) de TAGULO (H. B. Hyams, anglo), Hyams

ŝajnas tipe burĝa reformemulo, kiu povis brakumi samtempe — sed iom nebule — principojn de socialismo kaj teozofio, kaj vidi en tio nenian kontraŭdiron. Kaj, kiel multaj tiaj pensuloj, li trafis multajn celtabulojn, kaj multaj liaj „utopiaĵoj” hodiaŭ estas ĉie akceptataj. Lia utopio troviĝas sur Marso, kie la socio estas racie konstruita.

Aliaj utopiaj verkoj estas: *Landoj de l' fantazio* (1927) de Teo JUNG (germano, poste nederlandano); *Inferio* (1938) de H. J. BULTHUIS (nederlandano); *Invito al ĉielo* (1949) de James D. SAYERS (usonano). Oni povas diri, ke ĉiuj legiĝas flue kaj relative interese — tute aparte la rakonta kaj lingva talentoj de Jung vigligas la temon — nur kun tiu rezervo, ke la mondkonceptoj de ĉiuj tri aŭtoroj impresas iom naive, kiom ajn oni konsentas kun tiaj evidentajoj kiel ekz-e: „Ĉu ne estas honto, ke unu homo havas cent mantelojn, dum lia kunhomo devas iri nudkorpe? ... Ĉe ni neniu posedas, pli, ol lia najbaro; neniu volus posedi pli multe, kaj ĉiu ĉe ni hontus, se li posedus, kion ne povas posedi la alia ...” (*Inferio*, pl. 145). La verko de Sayers estas bazita sur interpretado de la Biblio, laŭ konceptoj de konata ekstrema religia sekto — lia socio ankaŭ troviĝas sur Marso, cetere — sed, akceptinte tion, oni legas ĝian disvolviĝon kun intereso.

Neniu el la ĝis nun menciitaj romanoj farus multe da bruo sur nacilingva tereno, sed kiam ni transiras al la kampo de pli akra utopiisma satirado, ni trovas du aŭtorojn, kies verkoj aperis ankaŭ nacilingve; apud la plej *malsukcesa* sed ambicia romano *Hura!* (1930) de Julio BAGHY starigaĵo *Vojaĝo al Kazohinio* (1958) de Sándor SZATHMÁRI (ambaŭ hungaroj), kiu estas unu el la plej maturaj verkoj en la tuta literaturo de Esperanto. Baghy atakas la socion ekstravagance-burleske, sed — nepre escepte ĉe li — li pli tedas ol trafas. Szathmári, kontraŭe, aliras intelekto le socion. Elektinte kiel sian kadron novan vojaĝon de Gulihero, kaj alpropriginte al si ties taŭgegan kaj konatan stilon, li priskribas por ni socion perfekte racian kaj socion prefekte malracian. Tiu satiro trafegas, kaj la sprito de la aŭtoro senĉese ĝuigas nin. Inter la Behinoj, ekzemple, seksa kaj ekskrementa korpaj funkcioj ne estas tabuaj, sed tiun rolon plenumas alia korpaj funkcio: la manĝado; kaj per transigo de moroj de unu kampo sur la alian, Szathmári vere montras la arbitrecon de multaj konceptoj pri „deco” kaj „maldeco”.

Turnante nin de la utopioj al la mondo „reala”, ni trovas, ke unuavice oni traktis ĝin tre romantike. Post frua, simpla rakonto *Lilio* (1918) de nia unua romanistino Edith Alleyne SINNOTTE (aŭstraliano), sekvis du gravaj kaj produktivaj aŭtoroj:

H. J. *Bulthuis* kaj *Julio Baghy*, kies utopiajn verkojn ni jam menciis. Krom *Inferio*, BULTHUIS verkis: *Idoj de Orfeo* (1923); *Jozef kaj la edzino de Potifar* (1926); *La vila mano* (1928). La unua el ili estas la plej sukcesa; sed ankaŭ la tria estis laŭdata de fidindaj recenzistoj. En *Idoj de Orfeo* ludas rolon ankaŭ la lingvo Esperanto: estas iom surprize, ke ĝi relative malofte sin anoncas en la verkoj de esperantistoj. Trinaskitoj hazarde edukigas en tri diversaj landoj, kaj kiam ili fine retrovas unu alian, Esperanto fariĝas ilia komunika lingvo. La rakontakapablo kaj stilo de *Bulthuis* estas eminentaj, kaj la sola iom ĝena ingredienco de *Idoj de Orfeo* estas iu mistera ĉefrolanto, kiu montriĝas en la fino ia dio aŭ eksternatura personaĵo. Tamen la ĝeno estas minimuma. Sama sinapogo per t.n. „supernaturaĵoj” iom makulas ankaŭ la verŝajnecon de *La vila mano*; tamen aliflanke en tiu romano oni trovas vere realisman priskribon pri la kamparana vivo en Nederlando. *Jozef kaj la edzino de Potifar* ne multe valoras, ĉar la ĉefrolantoj — malgraŭ la titolo ĝi ja ne estas historia verko — estas dudimensiaj kartonuloj, en kiun neniam enbloviĝas iom da vivo.

La dua romantikulo, BAGHY, fariĝis ĉeffiguro en la esperanta literaturo. Liaj trajtoj estas la eksceso kaj la sento, kiuj malsukcesis en *Hura!* sed en aliaj verkoj, notinde en *Viktimoj* (1925) kaj *Sur sanga tero* (1933) sukcesis submetiĝi al la atencena rakontivo de la aŭtoro, kies impeto kaj bravuro venkas la neverŝajnaĵojn. Ambaŭ verkoj naskiĝis pri la militkaptaj spertoj de Baghy en Siberio, kaj precipe *Sur sanga tero* estus atentinda romano en iu ajn lingvo pro la kolorplenaj rolantoj kaj la riĉeco de la lingvaĵo. La aliaj romanoj de Baghy estas *Printempo en la aŭtuno* (1931), simpla amrakonto, kiun iuj trovas naŭze sentimentala sed aliaj verdiktas bela kaj emocia; kaj *Paŭlo Paal* (1933) — presita en volumo „Verdaj Donkiĥotoj” — agrabla historio pri simplanima esperantisto.

Apud tiu pura romantismo aperis la fantaziemo de *Jean Forge* (polo), kiu estis profesia filmverkisto kaj reĝisoro. Lia unua romano, *Abismoj* (1923), pli parencas al la samtempaj romantikuloj, estante simpla amrakonto, kies tamen interesa fadeno disvolviĝas per rakontado unuopa far la kvar rolantoj. Tuj poste, en 1924, aperis *Saltego trans jarmiloj*, en kiu kelkaj karikature trajtitaj modernuloj sukcesas reiri en la epokon de Nerono. Oni povas diri, eĉ hodiaŭ, kiam la fantaziscienco estas konata kaj ĉiam pli arte akceptata formo, ke la sprito kaj lingva lerteco de *Forge* allogas la leganton. Lia tria romano, *Mr Tot aĉetas mil okulojn* (1931) estas teme eĉ pli ambicia, kaj vere restas aktuale ĝuinda malgraŭ la fakto, ke ĝia ĉefa temajo — televizoroj, kiujn milionulo instalas en ĉiuj ĉambroj de hotelego (por ŝtele vidi, ne por amuzi la klientojn!) — jam ne estas tiel fantazia. La romano legiĝas kiel skizo por filmo. kaj estas tre viva kaj amuza.

Baldaŭ, tamen, komencis aperi romanoj, kiuj volis pripentri la vivon iom pli realece, sen la sensa-

ĵoj, per kiuj la fantazio de la romantikuloj tiklis la legantaron. Certe la plej realisma el ili estis *Stella* ENGHOLM (svedo), kies unua romano, *Homoj sur la tero* (1932, 2a pligrandigita eld. 1963), priskribas la vivon de tri generacioj sur sveda farmbieno. Sekvis alia romano en tri partoj: *Infanoj en Torento I kaj II*, kaj *Vivo vokas* (1934, 1939, 1946 (la dua parto de *Infanoj en Torento* lastatempe reeldoniĝis kiel *Junuloj en Torento*), en kiu Engholm sekvas la sorton de grupo de malriĉaj infanoj en sveda industria urbeto ekde infanaĝo ĝis adoleskeco. Se kelkfoje la muzo de Engholm ŝajnas iom didaktika, tio neniel forprenas de la allogo de lia temo aŭ la vivanteco de liaj infanoj-junuloj.

Elstare matura verko, tre reprezenta pri sia epoko kaj firme radikigita en tiu turbulenta epoko, estas *Metropoliteno* (1933) de V. VARANKIN (sovetiano). Soveta inĝeniero, kies ambicio estas konstrui subteran fervojon en Moskvo, studas en Berlino kaj partoprenas la interbataladon de komunistoj kaj faŝistoj tie. Poste, reirinte Moskvon, li tie devas batali kontraŭ la burokratisma rifuzemo; sed en la fino li triumfas, kaj oni ekkonstruas la fervojon. Elstara kvalito de tiu ĉi verko (kune kun ĝia tiama aktualeco) estas la akra vida simpatio de la aŭtoro al siaj rolantoj, kiuj — precipe la inĝeniero — estas tridimensiaj kaj realecaj.

Du romanoj, kiuj ambaŭ aperis en 1934, ankaŭ alimaniere klopodis prezenti realajn facetojn de la socio. Unu el ili, *Maria kaj la grupo* de EMBA (E. Baranyai, hungaro), por la unua fojo prenis temon rekte kaj senpere el la vivo esperantista. Ĝi priskribas la historion de esperantista grupo, kun ties dividiĝo en la du partiojn: eternaj komencantoj, kaj dediĉitoj. *Maria* estas la motoro de la grupo — ĉu ne ĉiu grupo devas havi tian personon? — sed fine eĉ ŝi montriĝas senhelpa kontraŭ la personec-bataloj kaj ĵaluzoj de tiuj, kiuj malpli ol ŝi sentas la gravecon de la afero. *Tur-strato 4* de Hans WEINHENGST (aŭstro) pentras la vivon de la urbaj mizeruloj kaj malriĉuloj, kaj, kvankam ne potenca, tamen efikas.

Parencajn temojn al la supraj uzas N. BARTHELMESS (germano) en du romanoj pri kaj ĉefe por junuloj: *Juneca ardo* (1936) kaj *Vartejoj* (1938). Precipe la dua per temaj aŭdacaĵoj vekis indignon de kelkaj bonaj burĝoj.

Alia klaso de romanoj, siatempe tre populara, estas la detektivromanoj aŭ „misteroj”. El ili ni havas ĉefe tri: *Pro kio?* (1920) de ARGUS (F. W. Ellersiek); *La nekonata konato* (1932) de Douglas P. BOATMAN; kaj *Mistero minora* (1958) de Ferenc SZILÁGYI. La du unuaj estas sufiĉe rutinaj, sed la tria vekis intereson de multaj legantoj per sia nekutima temo kaj vere vigle vivanta kaj viveca lingvaĵo.

Restas ankoraŭ kvar ĉefaj verkoj, kiuj ne estas tiel facile klasigeblaj, sed (kune kun *Sur sanga tero*, *Metropoliteno* kaj *Vojaĝo al Kazohinio*) probable prezentas la ĉefan atingon de nia romanaro ĝis nun. *D-ro Dorner* (1945) de H. L. EGERRIP (dano) aperis ankaŭ en la dana. Ĝia temo estas la

LAJOS TÁRKONY

# PORTRETO

*Novembra vintrospira dimanĉa posttagmezo.  
La ĉambran lumon lante estingas la krepusko.  
Leviĝas el la ombro, el ĉi pase-embusko,  
memoroj sin trenantaj kun ploro-porta pezo.*

*La lampon mi enŝaltas por anim-anestezo.  
Ĉambro-promen'. Subite min kaptas sur la muro  
forgesiĝinta bildo, portreto de junulo,  
li min, kun libro mane, rigardas kun kareso.*

*Revivas mortaj jaroj, kun multo, multo kara,  
jen antaŭ mi mi staras, mi mem, la tridekjara,  
statur' ankoraŭ magras, harar' ankoraŭ blondas,*

*en mia koro povra, soleca kaj cikatra,  
longe dronintaj maroj kun ŝaŭmokrestoj ondas:  
lipoj allogas lipojn por trista kiso patra.*

ebleco korpe kaj anime plialtigi la kvaliton de la homaro per arta gravedigo de virinoj per elektitaj viroj — temo siatempe sufiĉe polemika kaj hodiaŭ ankoraŭ aktuala. Oni travivas en la romano la malfacilaĵojn spertitajn de la pioniroj de tiu biologia eksperimentado. *Kredu min, sinjorino!* (1950) de Cezaro ROSSETTI, estas unikaĵo, pli ol iom aŭtobiografia. La aŭtoro, bazarulo (aŭ vaganta vendisto), viglege priskribas la vivon kaj morojn de tiu periferia medio naskita de la kapitalisma sistemo. Liaj anekdotoj estas amuzegaj, kaj lia Esperanto sukcese rekreas la etoson de la bazarula slango. La verko aperis en hungara traduko. *Kiel akvo de l'rivero* (1962) de Raymond SCHWARTZ (franco) en sia unua, plej longa parto priskribas la vivon de franca studento en Germanujo de aŭgusto 1913 ĝis aŭgusto 1914 — idilio frakasita de la eksplodo de la Mondmilito. Krom ekscite gustoplena lingvaĵo, la verko eternigas kun amo vivmanieron delonge malaperintan, kaj desegnas morojn kaj homojn en tri dimensioj kun ĉiuj koloroj de vastgama paletro. Laste sed ne lasta aperas *Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud* (1963), en kiu la franco Jean RIBILLARD, en la personeco de dezerta azeno, mildsatire kaj suklingve rigardas la homaron kaj ĝiajn stultaĵojn amindajn kaj bedaŭrindajn. Vivinte la pliparton de sia vivo kiel dezerta soldato, la aŭtoro bele ensorbis la sekecan sagacon de la dezertuloj kaj sur ties fono delikate trapinglas la homan folecon.

Post tiu tre supra skizo pri la Esperanta romano necesas fari unu gravan konstaton. La saneco de la romano kiel artformo en Esperanto dependas antaŭ ĉio de la saneco de la eldonagado. Verki romanon postulas longan dediĉon kaj multege da laboro. Kiu volas oferi tempon, se en la fino li trovos indiferenton de eldonejoj, aŭ eĉ ties praktikan neekziston? Pluraj el la supre menciitaj verkoj atendis tre longe sian publikigon; sed eble la rekordon havas unu grava longa romano, kiu en la momento de mia skribado, malgraŭ plurfojaj promesoj, ankoraŭ ne eldoniĝis. Temas pri *La granda kaldrono* de John FRANCIS, pli ol 700-paĝa verko pri la du mondmilitoj, kiun la aŭtoro finverkis antaŭ (proksimume) 15 jaroj. Kiam fine proponis sin eldononto por la verko, oni anoncis ĝian aperon, sed ankoraŭ hodiaŭ post trijara prilaborado, ĝi kuŝas en la formo de presprovaĵoj. Mi supozas, ke ĝi iam aperos. Tamen pro la neglekto kaj indiferento John Francis jam delonge forlasis Esperanton, kaj tiel perdiĝis al ni unu el niaj elstaraj talentoj. Ĉu vi kulpigas lin? Mi ne. Kie kaj kiam denove aperos ia Hachette, ia Ellersiek kaj Borel, ia Literatura Mondo, ia Stafeto, kiu instigos kaj kuraĝigos la talentojn suriri ankoraŭfoje tiun penoplenan kampon, kie post taŭga kultivado fine refloros la romano kiel Esperanta artformo? Sen tia aŭ simila stimulo, la estonteco por nia literaturo kuŝas sub superombranta nubego.

## La Esperanta novelo

Pri la E-a novelo donas trarigardon la libro „33 Rakontoj”, eldonita de STAFETO en 1964 kaj havanta la subtitolon: „La Esperanta novelarto”. Pri la elekto de la noveloj, kiun faris Reto Rossetti kaj Ferenc Szilágyi, oni certe povas diskuti (kiam oni ja ne povus diskuti pri ia ajn tia elekto?), sed la E-aj novel-aŭtoroj, almenaŭ ĝis 1964, ĉeestas en la volumo senmanke, eĉ tro senmanke.

Mi komencis mian skizeton pri la E-a novelo per tiu ĉi libro pro tio, ĉar post ĝia apero ekflamis granda diskuto en Esperantio, kaj ke esperantistoj flame diskutas pri literatura demando, tio jam mem estas tre rimarkinda. La diskuton ekirigis la recenzoj, kies du ekstremoj estis unuflanke la plimalpli entuziasma laŭdo kaj aliflanke la skeptika preskaŭ indigna akcepto. Unu el ili enhavis la tre radikalan demandon: ĉu homoj lernintaj la lingvon ne forkuros el nia rondo tuj post la trarigardo de ĉi tiu volumo?

La plej detala kritikanto, *Claude Piron* (en Monda Kulturo) tiom perdis sian anim-ekvilibron, ke li disskizoidis en kvar apartajn individuojn. Unu el tiuj, la cerbulo, rekonis la reprezentivecon de la kolekto kaj taksis ĝin valora dokumento de la E-a prozo. La dua, la sensulo, trovis la pecojn plejparte stagnaj, malviglaj, agadmalriĉaj, finomankaj. La tria, la korulo, trovis la ĉi-suprajn riproĉojn skandalaj, ĉar ĉion kompenzas la vortmuziko kaj sentovibro. Fine, la kvara, tiu de profundpenetra psiko, trovis kelkajn juvelojn, sed li devis ilin elfosi el inter amaso da kaĉo, kaj al li trudiĝis la demando: kiom el tiuj pecoj nacilingva eldonisto kuraĝus prezenti al publiko, kiu konas la novelojn de Ĉehov, Maugham, Lu Sin aŭ Maupassant?

La malfavoraj recenzoj vekis reagojn. *Auld* konstatis, ke ĉiuj nacilingvaj eldonistoj aperigadas kolektojn de noveloj malsuperaj ne nur al tiuj de Ĉehov, Maugham ktp., sed ankaŭ al pluraj noveloj de la E-a kolekto. Szilágyi atentigis, ke la E-a novelo estas juna, multe pli juna ol la lingvo mem, se ne paroli pri tio, ke la normalan evoluon de nia literaturo obstaklis ankaŭ „historiaj diablajoj”. Sed ve, per ĉi tio unu el la redaktoroj jam kulpis ekskuzadon kaj per sia peto pri indulgemo instigis meti la demandon, ĉu entute povas ekzisti vera E-a novelarto. Krome: ĉu ĝi estas bezonata? Ĉu E-o ne restu ĉe la traduka interpreto de literaturaj valorajoj?

Sed teorio estas griza de post Faust. La fakto estas, ke ekzistas legeblaj noveloj originalaj, kia ajn miraklo tio estas. Jes, ĝi fakte estas miraklo: sen perspektivo de honorario, eĉ sen certa espero de publikiĝo oni verkas tiajn. Kaj se iu kun instrumajstre levita minaca montrofinĝo kondamnas ilin vantaĵoj nenecesaj, ĥimeroj utopiaj, mi kuraĝus kontraŭdiri, ke ili estas bezonataj. Konsiderebla tavolo de esperantistoj legas ja ilin volonte, preta akcepti ankaŭ ilian ne „plejaltan” nivelon. Multaj eĉ pli amas leĝeran kaj ne tro krutan legaĵon, kiel montras leteroj ricevitaj de niaj legantoj. Kaj oni ne subtaksu tiun amon al la verdaj ŝosoj de nia literaturo: tiu naiva amo povas aŭ devus esti kuntena forto por tiu nia tiel maldense dissemita familio. Jes, forto pli kuntena ol diskuriga. Foje hungara eminentulo diris en la televido ion tian, ke E-o ne havas aŭ ne povas havi literaturon, Je tio li ricevis tiom da protestaj leteroj, ke li nun — kiel li konfesis en intima rondo

— nenion tiel timas kiel la esperantistojn. Jen do, ĉi tiuj, aŭ multaj el ĉi tiuj, amas legi originalaĵojn E-ajn.

Alia ekzemplo pri tiu amo al la literaturo estas la efiko de *Julio Baghy*. Kunportinte post la unua mondmilito el la Siberia militkaptiteco, kie diversnaciaj kompatinduloj estis konsolataj de E-o, la sopiron je „homeco”, la kunsenton kun la falintoj, ian larĝbrakuman nostalgian amon al la homaro, li sciis tiun atmosferon transdoni al siaj legantoj ankaŭ en siaj noveloj kaj per tio kroĉi ilin al E-o. Li havis por tio siajn rimedojn: la romantikan (tro romantikan) agadon, la larmosolvitan stilon kaj — sialoke — ankaŭ la transkapiĝojn de burlesko. Li volis kvazaŭ krei medion, kies gvidanta stelo estas la zamenhofa „nova sento”: danĝera tereno, kun multaj kaptiloj kaj faligiloj. Kaj Baghy ankaŭ stumbladis, sed ne falis, estis kaj restis arda civitano de Esperantio. Kaj la esperantianoj, kiujn li varbis, restas fidelaj. Kiu lin subtaksus, tiu ricevus eĉ pli da protestaj leteroj ol la televida eminentulo.

Tute alia verkista karaktero estas tiu de *L. N. M. Newell*, kiu en sia novel-kolekto „Bakŝiŝ” verkis pri la homoj de la proksima oriento, pri la neeviteblaj, sed plejofte silentaj kolizioj inter angloj kaj araboj kontaktigantaj kun angloj. Li ne enestas en sia literatura medio kiel Baghy, li rigardas siajn novel-heroojn bonvole sed iel desupre, kun ia indulgema ironio. Tiu ironio trafas eble eĉ pli la anglojn kun ilia „kriekteca” moralkodekso, ol la arabojn; ankaŭ lia temoplekto estas interesa. „Maugham” — oni pensos. Nu, ne tute Maugham, sed ne multe malsupera.

*Ferenc Szilágyi* staras iel meze inter Baghy kaj Newell. Ankaŭ li rigardas siajn novelfigurojn kun milda ironio, sed samtempe brakumas ilin per sia simpatio kiel ia ora-kora oĉjo. El tiu oĉjeco fontis liaj fabeloj en „Trans la Fabeloceano”, kie popolfabela tono miksiĝas agrabla-kontraste kun modernaj malmirakloj. Sur kontrastoj estas konstruitaj ankaŭ pluraj el liaj noveloj, ekz-e la storio de la juĝisto, kiun hazardo venigas en preskaŭ sovaĝan anarkion kvazaŭ kompanse por la grizo de lia tro normala vivo. Li prezentas ankaŭ situaciojn ekvilibratajn sur tranĉilpinto kiel en „Flamsalamandro” aŭ en la novelo pri Dунant, fondinto de la Ruĝa Kruco.

Alia tono regas ĉe *Stellan Engholm*. Ankaŭ li estas humanisto, sed lia tro klarvida konsideremo lin devigas rigardi la mondon kun sobra realismo. Liaj ĉefaj kreaĵoj estas liaj romanoj, sed du liajn novelojn („Venĝo”, „Maljunulo migras”) mi kuraĝas, post kelka hezito, nomi majstraj. En la dua, ekz-e, li scias kun trankvila, senpasia rakontado akre konturi kaj plene vivigi maljunul-figuron ignoratan de siaj idoj, sed kiu malgraŭ ĉio gardas sian dignan memkonscion.

*Marjorie Boulton*, krom liriko, drametoj, eseoj kreis ankaŭ novelojn. En unu el ili montriĝas la konsekvencoj de tio, se oldeta fraŭlino de severmora, puritana edukiteco, trinkas ekster sia hejma medio iom tro da alkoholaĵo. Malĝentilaĉe, mi prenis tiun akcident-novelon por iela memportreto, kun la diferenco, ke M. Boulton trinkas ne alkoholaĵon sed Esperanton, kaj tiam ŝi devas eltrovi rakontojn faritajn kun strange bubina ĉarmo (Okuloj), aŭ ludeme filozofiajn okazaĵojn pri sia kato. Sed ankaŭ la profesorino prezentas sin en la humanisma varmo, kvazaŭpatrina zorgo pri la homaro, ellaborita strukturo kaj stilo de siaj noveloj.

*J. I. Francis*, laŭ sia novelkolekto „Vitrilo” (1960) estas aŭtoro rande de senreviĝo kaj pesimismo

## ALVOKO

*La Redakcio de Hungara Vivo ekde nun antaŭvidas publikigi ĉiunumere unu originalan novelon. Ĝi volonte farus tiel jam ankaŭ pli frue, sed malhelpis tion manko de materialo.*

*Ni invitas kontribui ĉiujn prozistojn de nia literaturo: aŭtorojn jam konatajn, kaj ankaŭ tiujn, kiuj fariĝos konataj eble ĝuste sur la paĝoj de Hungara Vivo. Volonte ni publikigos ĉiun valoran verkaĵon (tamen, la amplekso ne superu 240 liniojn!). Verkaĵojn, kiuj pro ia kaŭzo ne estas publikigeblaj en nia revuo, ni resendos al la aŭtoro. Por la publikigitaj verkoj ni pagos la kutiman honorarion.*

kaj tial li preferas la satiran tonon, vipante pseŭdomoralon, tiranisman, idioecon de potencavido, servilisman, kaj uzante por tio troigon kaj groteskigon en siaj historioj okazantaj precipe en la regno Juglando. Sed ankaŭ la koloroj de kompato kaj kortuŝiĝo ne mankas sur lia paletro.

Kaj jen estas la tiel bedaŭrata *Raymond Schwartz*, kiu bezonus apartan artikolon. La „terura infano” de la movado pripentras malgrand-urbajn aŭ vilaĝajn malgrandulojn, pastrojn, ĝendarmojn kaj similajn, kies reago je ia nekutimaĵo al ili okazinta akre lumigas ilian individuecon bagatelman kaj tamen tiel simpatian. Jen *J. B. Rosbach*, kun intereskapta revivigo de memoroj en la infanaĝo kaj el la tempo de la nazia teroro. Jen *K. R. C. Sturmer*, en kies noveloj, laŭ Johnson: „Subcivilizita glacitavolo la akvoj kirliĝas senripoze.” Vastan pritrakton postulus *Sándor Szathmári*, sed, unue, tio kondukus al apenaŭ finebla filozofia esoteraĵo, due, li estis jam vaste taksata en nia antaŭa numero.

En la noveloj de *Reto Rossetti* nin kaptas la multfacete brilanta, eternmova individueco de la aŭtoro kaj la majstreco, kun kiu li povas turni, fleksi, parade disvolvi la lingvajn eblojn. Ne hazarde, ke liaj plej brilaj skribaĵoj estas tiuj,

ekz-e la „Neologismologio”, kies novelfiguro estas la lingvo mem.

Inter la e-istaj kritikistoj iel estiĝis tiu opinio, ke ne povas esti valora tiu E-a originalo, en kiu la lingvo mem havas ian funkcion, aŭ kies agado okazas inter esperantistoj. Nu, *Jan Forge* kuraĝe rompis kun ĉi tiu principo en sia novelkolekto „Verda Raketo”. Kaj mi volus atentigi pri alia E-a verkisto *N. Mahé*, kiu en sia novelo „Iluzioj” povis ne nur interreskapte, sed rekte ekscite rakonti la sekvojn de E-a korespondado inter franca scienculo kaj japana virino. Per sia turnoriĉo la novelo rivalas kun krimia historio, sed sen krimo kompreneble, kaj post ĝia legado la majstre sentigata rezignacio de la fino neforviŝeble restas en la memoro.

Mia prezentado tute ne estas kompleta, plurajn meritajn novelistojn kaj novelistinojn mi ne povis mencii inter la kadroj disponeblaj. Sed eble mi povis montri, ke la novelistoj, kiujn mi menciiis, havas sian bone konturitan, difinitan kaj karakterizeblan individuecon inter si ne konfuzeblan. Kaj tio montras, ke la Esperanta novelarto ne estas ĥimero, ke ĝia skeptike rigardata nivelo devenas nek el la lingvo, nek el la novelaŭtoroj, sed el la cirkonstancoj, inter kiuj devas pene-klopode trabati al si la vojon la Esperanta literaturo.



# Gravega kultura evento

Jean FORGE: *Saltego trans jarmiloj* (Romano). Eldonis: Fondumo Esperanto, Helsinki, 1973. Serio Forge n-ro 2. 192. p. Broŝurita. (Fotorepreso de la unua eldono de 1924.)

La Esperanta kulturo multe suferis kaj suferas ankoraŭ pro la manko de la t.n. „vertikala integriteco”, kiun mi jam aludis antaŭ jaroj eĉ en du artikoloj. (Hungara Vivo 1972/2 kaj Norda Prismo 1972/2). Pro la manko de reeldona aktivado la novaj esperantistoj malmulte aŭ tute ne konis nian literaturan tradicion, eĉ tiuj ne, kiuj kun sincera strebado volis tion. Estas fakto tre ĝojiga, ke dum la lasta tempo tiu aktivado fortiĝis, tamen, vidante la anoncon, kaj parte jam la realiĝon de la plano de la finna *Fondumo Esperanto*, oni spertas ion senprecedencan: reeldonon de plena verkaro de originala prozisto. Tiu evento estas nepre mejloŝtono en la evoluo de nia literaturo, ĝi estas simptomo de matureco, kaj ni esperu, ke tiu ĉi gesto trovos imiton ĉe aliaj eldonejoj.

Jean Forge — certe ĉiuj scias, ke ĝi estas pseŭdonimo de pola originala prozisto, Jan Fethke, nun vivanta en Okcidenta Berlino — sendube klasiĝas inter la plej atentindaj figuroj de la Esperanta prozo. Inter la du mondmilitoj, kiam la Esperantan literaturon ankoraŭ ne sursidis la cerbograso de la industria socio, liaj romanoj konkuris en populareco kun la verkoj de Baghy. Diskutoj ne maloftis: iuj konsideris lin simple poramuza verkisto, aliaj trovis en liaj verkoj profundajn valorojn, kaj la decido ne estis facila, kiel alestas tion ankaŭ propramaniere farita prezento en la *De paĝo al paĝo* de Tárkony (Totsche) Tamen, unu virton agnoskis ĉiu recenzisto: la facilan, elegantan fluon de lia stilo, kio, almenaŭ el lingvoeduka vidpunkto, estas valida studindaĵo eĉ nuntempe.

Tenante en la manoj la reeldonon de liaj unuaj du romanoj, mi sentas certan embarason. La unua verko, *Abismoj*, en la kunteksto de la Esperanta literaturo klasiĝas pionira majstraĵo. (Tiom pli, ke la aŭtoro estis 20-jara junulo!) La dua, *Saltego trans jarmiloj*, ne estas pli ol banala — tamen ne seninteresa, nur malaltnivela — priverko de praa temo, la tempvojaĝo. Nu, sed ni komencu per la unua.

La historio mem ĉi tie ne multe gravas: ĝi estas kurtima amhistorio, ni eĉ ne perdu spacon por ĝin rakonti. Gravas la verkista metodo de la aŭtoro: la kvar rolantoj — Ernesto Muŝko, bohema, ruiniĝanta bienposedanto, Halino Borki, revema filino de alia, bonstata bienposedanto, Mateo Ardo, pentristo, kaj Zonjo Biringo, la fianĉino de Mateo Ardo — monologe rakontas la saman historion, ĉiu el sia vidpunkto.

Tiu formo — kiu en la mondliteraturo kompreneble ankaŭ jam en 1923 ne estis tute nova — signis komenton de io nova en la Esperanta prozo. Forge neglektis la ĝis tiam ekskluzive aplikatan, rigore kronologian rakontmanieron, kiu vere taŭgis prezenti nur *eksterajn eventojn*, sed ege limigis la povon de la aŭtoro, se li scivolis unuavice pri tio, kio okazas interne de la homa animo. La tekniko, kiun aplikis Forge — cetere tute vulgara jam en la moderna prozo — ebligis al li penetri multe pli profunden en la homa animo, ol faris liaj antaŭuloj. La kronologio perdis sian tronon, tamen la skeleto de la verko ne disfalis: kuntenas ĝin forto multe pli signifa, nome la logiko de la animaj okazajoj de la rolantoj.

Kompreneble, tiu konstru-tekniko postulis ankaŭ propran stilon, ja la korektaj, elegantaj frazoj de la bele kombita prozo ne taŭgus esprimi fidele aĵojn esence nelogikajn: ja kiu el ni revas, malĝojas, kole-ras, sopiras en si per Kabe-aj korekte konceptitaj frazoj? Abundas ĉi tie la frazoj nefinitaj, nekompletaj, kiuj ne eksplikas, nur signas iun sent- aŭ pensasociiĝon, lasante la ceteron al la cerbo de la leganto. Oni renkontas, kvankam neofte, ankaŭ abruptan, nesignitan ŝanĝon de la subjekto, kaj foje-foje la aplikon de la *libera nereakta stilo* (style indirect libre) — ambaŭ teknikoj jam intimaj en la moderna literaturo.

Ĝindaj estas ankaŭ la rapidaj bildoŝanĝoj, ofte eĉ interne de la frazo, kio cetere ŝuldiĝas al la inklino, kiun li sentis por la kinoarto. Cetere, la moderna nacilingva proza stilo ankaŭ multon lernis de la filmo.

Sendube, tiu stilo malhavas perfektecon en si mem — nature, ĉi tie mi ne aludas *lingvan* perfektecon —, sed konsidere, ke Forge faris pioniran laboron, liaj atingoj estas pli ol kontentigaj. La ĉefa malvirto estas la forta romantisma-esprimisma stila influo, de kiu li ne povis liberiĝi, sed konsidere ke tiutempe ĝi estis reganta stila tendenco, oni mirus pro la malo. Tiu stilinfluo kompreneble infektas iomete la tutan romanon per certa teatra deklamodoro, sed rifuĝi de tio eĉ Baghy ne povis.

Resume: *Abismoj* por ĉiam restos kara juvelo de nia prozo, komenco de neplenumiĝinta promesplena evoluo. La nura historio estas nenidira, sed ĉe tiu romano oni spertas la samon, kiel ĉe la operoj: tie la banalan historion flugigas al altoj la muziko, ĉi tie la konstruo kaj la rakontmaniero. Se la vojo, kiun Forge suriris per sia unua romano, dum la pasinta duonjarcento ne restus dezerta, nia prozo nun povus fieri almenaŭ pri samnivelaĵ verkoj, kiel la Esperanta poezio.

Sed, bedaŭrinde, Forge mem forlasis tiun vojon. La dua romano, aperinta post unu jaro, revenis al la bone tretita, konvencia pado. Certe, la historio estas multe pli alloga, ol tiu de *Abismoj*: la tempvojaĝo ĉiam kaptis la intereson de la legantoj, kaj la renkonto de du kulturoj (homoj de nia jarcento vojaĝas al la antikva Romio) enhavas eblojn, kiuj promesas facilan sukceson. (Eble en Esperantujo ne: *Saltego trans jarmiloj*, same kiel *Abismoj* bezonis preskaŭ 50 jarojn por forvendiĝi!) La aventuroj de Fromaĝi, fraŭlino Snob, Tabakaĉ (atentu pri la parolaj nomoj!) certe ridigas la ne tro pretendeman leganton, sed post la tiel promesplena *Abismoj* tiu ĉi romano reprezentas egan artan regreson. Kompreneble, ĝia reeldono estas salutinda malgraŭ ĉia kritiko, pro du kialoj: oni ekkonas per ĝi la verkistan karieron de Forge, krome pro sia facila lingvaĵo (cetere la samo validas ankaŭ por *Abismoj*!) ĝi povas alkiutimigi novajn esperantistojn al la legado.

Espereble, la esperantistaro forte subtenos la gravan kaj aŭdacan iniciaton de la *Fondumo Esperanto*. Baldaŭ aperos ankaŭ la ceteraj tri volumoj de la vivo-verko — *Mr. Tot aĉetas mil okulojn*, *La verda raketo* kaj *Mia verda brevierio* — el kiuj la lasta estas nova verko de la maljuna aŭtoro. Ni pruvu ankaŭ per inda aĉetemo la maturecon de nia kulturo.

Vilmos BENCZIK

# La proza stilo en Esperanto

La stilo — maniero kiel skribi — estas dekomence surtabla problemo de la esperantistaro. En la *Enciklopedio de Esperanto* Tárkony distingas tri periodojn en la evoluo de la esperanta stilo: 1-a — „periodo de stil-influo”. En tiu ĉi periodo la stilo diverĝis laŭ la nacieco de la aŭtoroj, kiuj malgraŭvole enportis la influon de sia nacia lingvo, eĉ uzante plejparte intence platan, sekan lingvon, por esti internaciaj. La 2-a epoko estis la periodo de la lingva internacieco, en tiu ĉi epoko ĝeneraliĝas la respekto de la postulo, kiun Zamenhof eldiris jene: „La stilo Esperanta ne imitas blinde la stilon de aliaj lingvoj, sed havas sian karakteron tute specialan kaj memstaran, kiu ellaboriĝis en la daŭro de longa praktika uzado de la lingvo...” Tiu ĉi periodo servas kiel bazo por la 3-a etapo, kiu estas tempo de la formiĝo de la literatura stilo.

La ebleco de propra, persona stilo en Esperanto jam delonge estas pruvita, ĝin neas nur neinformitaj malamikoj de la Internacia Lingvo. (La parodioj de Baupierre — *Specimene* — eĉ atestas konsiderindan evoluintecon de la literatura stilo.)

Estas tute natura afero, ke la literaturo, kies materialo estas la lingvo mem, havas certajn tendencojn koncerne la lingvon. Konforme al la ĝenerala evoluo de nia literaturo, unue la poezio prezentis la punktojn, kie la komuna lingvo — kiu estis la produkto de la supre skizita dua periodo — ne respondis al ĝiaj bezonoj. Tiuj tendencoj tuŝis antaŭ ĉio la vortaron de la lingvo, kaj certgrade ankaŭ la vortfaradon: la komunlingva Esperanto esprimis multajn konceptojn per vortkunmeto aŭ trosufiksitaĵoj, longaj vortoj, kio siavice kontraŭdiras la bazan

koncepton de la *denseco* de la poezia lingvo. La konservativaj rondoj de la Movado, kiuj timis la eblan malfaciliĝon de Esperanto, forte kontraŭbatalis la influon de la poeziaj neologismoj. Malgraŭ ĉio ĉi la batalo finiĝis kun la venko de la neologoj, kaj sekve de tio nia poezio nun havas lingvon, kiu donas liberan eblon por kreo de ajna poezia stilo.

La esperanta prozo ĝis nun ne starigis tiajn pretendojn antaŭ la komuna lingvo, pro du kaŭzoj. Unue, ĉar la lingvo de la literatura prozo per si mem estas multe pli proksima al la komuna lingvo, ol tiu de la poezio, kaj *due*, ĉar la esperanta prozo ankoraŭ ne atingis tiun gradon de la artismo, en kiu la nunaj ebloj de la komuna lingvo ne respondus al ĝiaj bezonoj.

La maksimumo, por kiu la proza stilo ĝis nun strebis kaj strebas ankoraŭ nun, estas la elvokivo, la *vidiga* prezento de la direndo. Ankoraŭ nia literatura kritiko ne postulas pli: ĉe la plimulto de la aperantaj verkoj eĉ la postulo pri internacieco ne estas kontentige plenumita.

En la elforĝo de la esperanta stilo okupas gravan lokon la influo de la stiloj de la naciaj lingvoj, kaj kompreneble, niaj aŭtoroj ankaŭ literature ne povis eviti la influon de la stiltendencoj, florantaj en la naciaj literaturoj.

Pro la nekoŝereco de la evoluo de la esperanta prozo, tempa divido ne estas ebla, ja la diversaj tendencoj kunvivas. Oni spertas fruan aperon de avangardaj stiloj, kaj eĉ nuntempe aperas verkoj, kiuj sekvas aŭ jam eksmodan tendencon — ekz. romantisman — aŭ la Kabe-an glatan, kaj iom sensukan „internacian” stilmodelon. Tamen, ekzamenante nian ori-

ginalan prozon, ni povas distingi kelkajn ĉefajn stilmodelojn.

La *unua*, kaj sendube la plej disvastiĝinta estas la Kabe-a. Kvankam Kabe mem ne verkis originale, lia facile legebla stilo, kiu emis foroferi nuancojn por gardi la simplecon, trovis ne multajn adeptojn. Tiu stilo apenaŭ diferencas de la komuna lingvo, sekve ĝia informivo estas relative malgranda. Tiu ĉi modelo estas de movada, t.e. de interna origino, kaj influis pli-malpli preskaŭ ĉiujn niajn prozistojn. Oni ne povas preteratenti, ke la plimulto de la legantoj — pro nesufiĉa kono de la lingvo — povas digesti nur verkojn, kiuj estas sufiĉe simplaj.

Kiel duan, oni povas nomi la romantisman stilon, tamen iom diluitan. (La esperanta romantisma stilo memorigas unuavice pri la stilo de Dickens.) Ĝiaj plej gravaj reprezentantoj — kompreneble en malsama nivelo — estas Vallienne, Luyken kaj Baghy. En la verkaro de Baghy la romantisma stilinfluo tre ofte kombiniĝas kun secesiaj kaj esprimismaj stilelementoj. (Ĉe Vallienne kaj Luyken la romantismo miksiĝas ĉefe kun realismaj elementoj.)

*Tria* grava tendenco en nia stilo estas tiu de la realisma stilo. Ĝi karakterizas unuavice la nordajn aŭtorojn, ĉefe la verkojn de Engholm kaj la prozon de Adamson (Auli).

Sendube, el la supraj tri tendencoj nur la lastaj du estas vere literaturaj, la unuan oni povus nomi „simpligita realisma stilo”. Menciinde ke la romantisma kaj realisma stiloj ambaŭ estas produktoj de la 19-a jarcento.


La prozan stilon de la grandaj naciaj literaturoj plej signife influis en nia jarcento du verkaroj: la Proust-a kaj la Faulkner-a. Ni

vidu, ĉu la esperanta literaturo profitis iom el tiuj du verkaroj.

Bedaŭrinde, la respondo estas kategoria *ne*. La libera asociiĝo — kiu estas la ĉefa invento de Proust — neniam gajnis signifan rolon en nia prozo. (Esceptoj malmultas: Sturmer, la *Abismoj* de Forge, kaj lastatempe la *Disko* de Rosbach.) Specialan rolon el tiu vidpunkto havas la postlasita nefinita verko de Jean Ribillard: *Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud*. Ĝia stilo utiligas multajn inventojn de Proust, kaj sendube tiu ĉi libro estas la reprezentanto de la plej moderna stilo, ekzistanta ĝis nun en Esperanto. Ĝian valoron malpliigas nur la ioma trouzo de neologismoj. Spuro de la Faulkner-a stilheredaĵo ankoraŭ ne estas spertebla en la originala prozo.

La stilevoluon de nia jarcento karakterizas la pligraviĝo de la stilo inter la ceteraj elementoj de la artverko, kion mi povus nomi elformiĝo de la t.n. *krea stilo*. En la klasika literaturo de la pasintaj jarcentoj la stilo estis ĉiam dua-grada elemento, subigita al la enhavo, personaĵoj ktp., ĝin oni povas nomi *aplikita stilo*. La koncepto de la *krea stilo* kompreneble ne signifas, ke ĝi superregas la enhavon. La stilo ankaŭ ĉikaze servas la direndon de la artisto, nur ĝia rolo fariĝas pli grava, pli ol ilustra: almenaŭ samranga kun tiu de la historio. Tian tendencon montras la verkoj de la jam menciitaj du aŭtoroj, kaj nuntempe aparte la nova latin-amerika romano: la verkaro de Asturias, de Vargas Llosa (speciale *La verda domo*) kaj la *Cent jaroj de soleco* de García Márquez. En la originala prozo ĝis nun eĉ eksperimente ne aperis tia ĉi *krea stilo*, kaj verŝajne ankoraŭ longe ni devos atendi ĝin.

Kiel jam menciite, la moderna proza stilo ne bezonas ampleksigon de la vortaro, do ŝajne kontraŭstaro flanke de la legantoj ne malhelpus ĝian naskiĝon. Bedaŭrinde, tio estas nur ŝajno, ja la grandeco de la utiligita vortprovizo ne sola difinas la facilecon aŭ malfacilecon de iu teksto. La moderna proza stilo enhavas du elementojn, kiuj strikte kontraŭas



Manoj — desegnaĵo de László Lukovszky

la bazajn postulojn de la komunlingva esperanta stilo: *unue*, ĝuste ĝia kvazaŭ-deviga diverĝo de la *komunlingva* stilo, ja tio produktas la *surprizon* por la leganto; *due*, la tendenco al neprecizeco, obskureco, kiu volas intense laborigi la cerbon de la leganto. (Tiu ĉi lasta propraĵo postulus certajn licencojn en la sintakso, ekz. en la kazo de la apliko de la libera nereakta stilo — *style indirect libre*.) Ĉio ĉi jam signas, ke modernstilaj originalaj romanoj ankoraŭ longe ne fariĝos legaĵo de la plimulto de la esperantistoj. (Ankoraŭ nacilingve povas digesti tiaĵojn nur la kremo de la leĝpubliko.) Tamen, apero de kelkaj eksperimentaj noveloj estus sendube bona, tiom pli, ĉar ili influus kuraĝige niajn tradicistilajn aŭtorojn, kio estas ege necesa, ja la nuna *meza* stilo esperanta estas tre malmulte artisma, oni povas nomi ĝin simple plata.

Kompreneble, ankaŭ la malalta stilkulturo fontas el la samaj kaŭzoj, kiel la ceteraj malsanoj de nia literatura prozo: nome, la pro-

zo — diference de la poezio — bezonas profesiajn verkistojn, kaj nia kulturo ne estas sufiĉe forta por elteni finance tian ŝarĝon. Aliflanke, la lingvaj kapabloj de la legantaro *eble* (ĉu?) sufiĉas por digesti kelkdeklinian dens-lingvan poeziaĵon, sed neniel dens-lingvan kelkcent- aŭ kelkmil-linian prozaĵon. Do, nia kulturo momente povas, nek verkigi, nek legi prozon, kiu respondas al la nivelo, establiĝinta en la naciaj literaturoj.

Trovi la elirvojon ne estas facile. koncerne la legantaron la postulo estas simpla: altigo de la lingva nivelo. En progresaj kursoj oni faru ne nur *lingvajn*, sed ankaŭ *stilajn* ekzercojn. Kaj koncerne la produkton? Sendube, el la du prozaĵ ĝenroj — novelo kaj romano — estas pli evoluinta la unua. La nuna produkto ankaŭ kvante malsufiĉas, do la ĉefa tasko estas kreskigi la nombbron de la jare aperantaj originalaj noveloj, kun prefero al la stile maturaj pecoj. La kvanta kresko pli-malpli frue naskos ankaŭ kvalitan evoluon.



**Pál Losonczy, prezidento de la Prezida Konsilio**

parolis en la industria urbo Salgótarján pri la stato de la agro-koopoj. La reformo, per la ĉesigo de la plan-devigiteco kaj per la granda memstareco de la koopoj, favoris ties progreson ekonomian, politikan kaj socian. Nia agrokulturo jam de jaroj plene kovras la enlandan merkaton; el greno ni povas eksporti. Problema estas ankoraŭ la sukerbeto-produktado; la bovobredado jam estas en la komenco de la prosperiĝo. La solvo de ĉi tiuj problemoj superas la agosferon de la koopoj, postulas tutsocian atenton kaj investon pli grandan ol la ĝisnuna, por realigi la plej modernajn metodojn kaj la koncentradon; ĉi-rilate ni jam metis signifajn paŝojn. Per la socialista terproprieto kaj granduzina agrokulturo la kampularo iĝis unueca klaso kaj nerompeble federigis kun la laboristaro. La koopa kampularo, en la pasintaj 25 jaroj, evoluis jarcentojn en konscio, en produktadaj kaj teknikaj konoj: el senhavigita, ekspluatata socia tavolo ĝi fariĝis egalrajta, egalranga socia faktoro, plenvalora federulo de la laborista klaso. Alten jam arkas la kariero de la koopa mastrumado kaj materiale kaj teknike. Harmoniigis la klasaj, grupaj kaj individuaj interesoj de la kampularo. Oni povas diri, ke ĝi trovis sian lokon inter la novaj vivokadroj kaj donas al la komuno sian menson kaj kordon.

\*\*\*

Teknikajn novaĵojn al eksterlandaj merkatoj eksportas pluraj hungaraj entreprenoj; instige efikas ĉi-rilate, ke ili havas memstaran eksport-raĵton, do povas ligi senperan interrilaton kun la mendantoj. La Hungaraj Optikaj Uzinoj liveras geodeziajn kaj laboratoriajn instrumentojn ĉefe al Brazilo kaj Peruo. La Instrument-Uzinoj Ganz eksportas precipe al evoluantaj landoj

establaĵojn de ĉeflernejoj. La Entrepreno de Kontor-maŝinoj kaj Fajnmekanikaĵoj eksportas al kapitalistaj landoj en valoro de 100 000 dolaroj plej modernajn kasmaŝin-sistemojn; ties eblecon ĝi faris komune kun la Anker-firmo en FRG. Propra inventaĵo estas la maŝino de fakturado kaj kvitanĉpresado por kelneroj, el kiuj por 1974 jam mendis Ĉeĥoslovakio kaj GDR. El pluraj landoj oni interesiĝas pri la propra-patente fabrikita aŭtomata komposto-skribo-maŝino.

\*\*\*

La iaman fortikaĵon de la magnata familio Nádasdy en Vasvár oni transformos en kulturalan centron. Por la restaŭro de la kvinangula renesanca-stila limfortikaĵo oni elspezos 15 milionojn da forintoj kun la subteno de la Eduka Ministerio, Departementa Konsilio kaj Landa Inspektorejo de Artmonumentoj.

\*\*\*

Ekde kvaron-jarcento Hungario partoprenas la programojn de UNESKO. Eĉ listigi estus malfacile tiun multdirektan aktivecon, kiun ni tie disvolvis, ni mencias do nur kelkajn gravajn faktojn el la lastaj du jaroj. Elstara estas la rolo de hungaraj scienculoj en la aktiveco de UNESKO, precipe en hidrologio, biosferaj esploroj kaj geologio. En Budapeŝto okazis internaciaj konsilioj pri Lingvistiko kaj Lingvo-esploro; niaj fakuloj partoprenis en la ellaboro de la demografia programo; niaj scienculoj gvidis biologiajn esplor-ekspediciojn en Afriko kaj Suda Ameriko; en Budapeŝto okazis konferenco de sciencpolitikaj fakuloj pri la plivastigo de la scienca kunlaboro. En Kecskemét sub la aŭspicioj de UNESKO oni tenis la duan Kodály-seminarion; en Sopron okazis internacia seminario pri la funkcio de la televido en la eduko de la gepatroj. Oni povus daŭrigi, sed ni elektis nur kelkajn el la multaj.

\*\*\*

Pasintjare 217 agrokulturaj kooperativoj (de nun: koopoj) gajnis la distingon „eminenta”. La ĵurnalo de HSLP enketis pri metodoj kaj mastrum-principoj de la plej bonaj koopoj. El la informoj de iliaj prezidantoj montriĝas, ke ĉiu tia koopo-komunumo iagrade estas „individuo”, oni do ne povas altrudi mastrum-principojn, eĉ se tiuj estis plensukcesaj en alia koopo. La ŝarĝoporta povo de la membraro diversas en periodoj diversaj. Tre gravas la favoraj ekonomio-politikaj kondiĉoj. Grandan ĝeneralan aprobon trovis ĉi-rilate la direktad-reformo, kiu pliiĝas la interesatecon de la membroj en la produktado kaj certigas al la koopoj grandan memstarecon, tiel ke ili povas sin teni al siaj naturaj kaj ekonomiaj donitaĵoj. Tre multe la koopoj progresis en la mehanizo de la agrokulturo. Tamen, eĉ la plej granda kaj moderna investado ne estos lukrigo, enspeziga, se la ĉefa faktoro de la produktado, la homo, ne estas kapabligita. Konvena fakulgvardio necesas, ĝia salajrado estas la plej bona investo. Nepras la prepariteco de la gvidantoj; plena orientiteco en la komplikaj taskoj, povo interkompreniĝi kun la homoj, ĉar sen la observo de la koopa demokratio ne povas naskiĝi bonaj rezultoj. Se gvidantaro kaj membraro estas unueca, tiam la koopo povas venki ĉiujn malfacilaĵojn.

# panoramo

En Londono ekfunkciis la Hungara Internacia Banko, kies akciuloj estas la Hungara Nacia Banko, la Eksterlandkomerca Banko, la Landa Sparkaso kaj la Viena Zentral Wechsel und Creditbank A. G. Okaze de la bankmalfermo restadis en Londono hungaraj financafakuloj, inter ili Dro László, prezidanto de la Hungara Nacia Banko. Li aranĝis akcepton, kiun partoprenis pluraj ministroj, G. Richardson, reganto de la Bank of England kaj pluraj reprezentantoj de la Londona ekonomia kaj financa vivo.

\*\*\*

En Szeged daŭras la rekonstruo de la plej granda viand-industria uzino; la laboroj kostos 1.1 miliardojn da forintoj. La centjara tradicio de la Szeged-a salamofabrikado motivas, ke la registaro faris apartan dekreton pri la kreo de moderna viand-industria kombinato. Post la pretiĝo de ĉi tiu la salamo-fabrikado en Szeged duobligos. Helpas la laboron ankaŭ la Kom. Junulara Federacio, kiu surpronis ties patronadon.

\*\*\*

Libro pri Hungario aperis en Sovetunio el la plumo de A. Ter-Grigorjan, informisto de la gazeto Izvestija. Bone parolante la hungaran lingvon, li povis krei senperan interrilaton kun fabriklaboristoj en Budapeŝto kaj en provinco, kun anoj de socialista brigado, kun fruktoproduktaj kooperanoj, kun aktoroj, inĝenieroj, poetoj kaj scienculoj; en la lasta riporto pri János Kádár li donas intereskaptan kaj aŭtentikan portreton. Li sciis tiel travivi la problemaron de la hungara socialismo-konstruo, fondita sur diferencaj tradicioj, sub diferencaj kondiĉoj ol la rusaj, ke li sciis ĝin „traduki” por la sovetaj legantoj. La titolo de la libro estas „Ce la ĉefpordego” t.e. antaŭ la eniro en la socialismon. Ĝi ampleksas 160 paĝojn kaj aperis en 50 000 ekzempleroj.

\*\*\*



Fine de la jaro 1973 aperis en Hungario poŝtkarto kun surprisita Esperanto-poŝtmarko (vidu la bildon). Okaze de la 3a Vintra Esperantista Ferio en Budapeŝto (28. 12. 1973 — 2. 01. 1974), kiun partoprenis — krom hungaroj — pli 260 personoj el kelkaj landoj, loka poŝtoŭficejo uzis esperantlingvan memorstampon kaj unuan stampadon la 28 dec 1973.



Ensemblo de „Avas” (Miskolc)

\*\*\*

La „Eŭropo-premion”, pagatan el la Goethe-Fondumo, kiun grafo Bernadotte metis en 1969 en Bazelo, ĉi-jare ricevis Dro László Madas, arbaristo. La celo de la fondumo estas akceli kreon de verda savozono por la homoj sufokigantaj en fumo. Dro Madas kreis ĉi-koncerne ion vere imponan: la parkarbaron de Pilis, kiu de Budapeŝto ĝis Esztergom sterniĝas por la ĝojo de ripozemaj, refreŝiĝemaj homoj, kaj kies belaj montsuproj kaj valoj fariĝis favorataj ekskursejoj. Tio estis, vere, laŭ la postuloj de la Fondumo, „grandmezura kaj ekzemplodona rezulto en la ŝirmo, flegado kaj evoluigo de la natur-medio”.

\*\*\*

Artindustrian ekspozicion oni aranĝos venont-somere en Toronto (Kanado). Nian patrimon reprezentos 71 kreaĵoj de 15 artistoj. La hungarajn kreaĵojn poste ekspozicios ankaŭ la Metropolitanana Muzeo en New York.

\*\*\*

Tritaga internacia konferenco okazis en Budapeŝto kun la titolo: „Elformiĝo kaj evoluo de la metioj en Eŭropo ekde la 5-a ĝis la 14-a jarcento”; ĝin aranĝis la Arkeologia Instituto de la Hung. Sc. Akademio kaj la Hungara Nacia Muzeo. En la programo troviĝis ankaŭ ekskursoj, per kiuj la partoprenantoj povis ekoni loka kelkajn signifajn elfosadojn de la lastaj jaroj, kaj restaŭron de artmonumentoj. Samtempe okazis ilohistoria ekspozicio en la Hung. Nacia Muzeo.

# ESZTERGOM 1000-JARA

Miljara pasinteco de iu patina urbo alvokas jam per si mem la atenton pri ĝi, elvokas distingan respekton de homoj, kiuj ne vane serĉas ion interesan, ekkonindan kaj aprecindan el la Hieraŭo kaj Hodiaŭo de tia „veterana” urbo.

La hungara nacia ekzisto en la nuna patrio superas jam pli ol 1000 jarojn, la solenan jubileon oni tenis en la pasinta jarcento (1896). Logike metiĝas do la demando: ĉu restis ankaŭ urboj ĉe ni, kiuj same ĝisvivis tian Metuzaleman aĝon kaj simile havas do miljaran historian paseon. Nia respondo estas jesa.

Kronologie kiel al la unua pasintjare omaĝis nia lando al urbo *Székesfehérvár* okaze de la miljara datreveno de ĝia fondiĝo (vd. 2/1972. H. V.) Kiel unua rezidejo, elektita de duko Árpád, la gvidanto de la patrujokupanta hungaraŭro, poste kiel scenejo de kronadoj, geedziĝfestoj kaj entombigoj por longa vico de la reĝoj, fine kiel loko de landkunvenoj kaj eldonloko de reĝaj dekretoj, la urbo iĝis ĉefa loko de la lando.

Pasis relative malmulta tempo kaj ni trovas la regnestran sidejon jam aliloke. Versajne pro politikaj motivoj (orientiĝo al okcidento) la regnestro *Géza* (947—997) translokis sian restadejon ĉirkaŭ la 970-aj jaroj norden, apud la riveron Danubo, sur loko de la nuna urbo *Esztergom* (vd. 2/1965. kaj 2/1972. H. V.). *Esztergom* rajte meritas do fieri pri sia epiteto „miljara antikva loko” kaj rajte aranĝis pasintjare jubileajn solenaĵojn.

Brilaj kaj tristaj paĝoj alternas en la analoj de *Esztergom*. Rektan linion montras ĝia evoluo en la unuaj jarcentoj. Politike gravas, ke en tiu urbo naskiĝis kaj estis kronita la unua hungara reĝo *Stefano*, la ŝtatfonda (vd. 4/1970. H. V.). Li kaj liaj posteuloj en *Esztergom* eldonis la unuajn leĝojn de la lando. Tie okazis la centra gvido de la ŝtato kaj eklezio. Tie estiĝis la unua reĝa kancelario por enkonduko de la skriba ŝtataadministrado. Tie funkciis la reĝa monfarejo, kies produktaĵo, la hungara arĝenta mono, ofte havis valoron ankaŭ internacie. Granda estis tie ankaŭ la transira komerca trafiko inter foraj landoj. Inter la hungaraj urboj ĝi estis la unua, kiu havis rajton en sia foiro haltigi kaj dogani la varojn importitajn aŭ liverotajn trans la limojn. La nombro de ĝia loĝantaro, kulmine de la mezepoko, estis taksita je ĉirkaŭ dek mi-



*Sanktejo de la reĝa kapelo (XIII-a jc.)*

loj kaj tiu etato egalas kun tiu de la tiamaj Eŭropaj grandurboj. La politika reputacio, riĉeco kaj beleco de la urbo destinis *Esztergom* iĝi siatempe ĉefa loko, centro de la mezepoka Hungarlando, unua urbo de la lando en mezeŭropa senco.


Al la plua prosperiĝo metis finon la unua nacia katastrofo. Kvazaŭ kataklisme trafis la landon la neatendita invado de la mongoloj-tataroj el oriento en 1241. Itala pastro, Rogerius, poste ĉefepiskopo en Spalato (Split), restadis tiutempe en Hungarlando kaj suferis ĉiujn teruraĵojn de la dujara detruado. Kiel senpera, objektiva atestanto li rakontis siajn eventojn en memorskribaĵo „*Carmen miserabile*” (Kanto lamenta). Aŭdu detaletojn el tiu funebra kanto.

Nombra popolo de riĉaj burĝoj, nobelaj bravuloj kaj sinjorinoj kolektiĝis en la urbo taksante ĝin fidinda fortaĵo. Kiam ili rimarkis, ke tamen ne eblas sin defendi, ili bruligis la lignajn domojn, multe da drapoj kaj vestaĵoj, murdis la ĉevalojn, kaŝis la trezorojn, oron, arĝenton en la tero kaj rifuĝis en la ŝtonajn domojn. La tataroj ege furiozis pro la neniigo de la esperita predo kaj sieĝante la domojn, neniu indulgis, kruele masakris, vive bruligis la homojn kiel porkidojn. „Se diri la veron, mi ne kredas, ke en la tuta urbo restintus vivaj eĉ 15 homoj” — lamentas la mezepoka atestanto.

Kiam falis la palaco, kie kolektiĝis la riĉulinoj, ili petis aŭdiencon de la tataro estro por petegi por



*Maria — de nekonata  
itala pentristo el la  
XIV-a jarcento*



*La Kalvario — de  
Majstro M. S., granda  
hungara  
pentristo en la XVI-a  
jarcento*

nura vivo. Sed la estro, kolere pro la predoperdo, ordonis prirabi kaj poste senkapigi ilin. La ordono estis plenumita. Ĉio ĉi okazis sube en la urbo, sed ties fortikaĵon sur la monto savis ĝiaj defendantoj, la hispanaj arkistoj.

Post paso de la uragano estiĝis nova situacio.

Vivis ankoraŭ la timo pro eventuala reveno de la tataroj kaj pro tio reĝo Adalberto IVa (1206—1270) konstruigis fortikaĵon sur la nuna Burgmonto en Buda, translokis sian rezidejon tien, kaj permesis, ke la burĝoj transvivantaj la uraganon ricevu azilon inter la ŝtonmuroj de la citadelo en Esztergom. Sed dektri jaroj en la praktiko montris, ke tiu helpo povas esti nur provizora. Nome, la ne sufiĉe ampleksa montsupro malebligis tie la pacan najbaran apudvivadon. Daŭra kverelo, laŭtaj disputoj, eĉ armilaj atakoj okazis ĉiutage inter la loĝantoj, laikoj, eklezianoj. Por krei ordon en la kaoso, finfine la reĝo definitive redonis la nordan montsupron kaj la iaman reĝan palacon al la eklezio kaj en la sama dokumento (17. Dec. 1256) li donis al siaj burĝoj la rajton fondi urbon sur ties malnova, tradicia loko.

Tiel okazis, ke Esztergom, krom esti iama centro de la mezepoka Hungarlando kaj esti malnova urbo kun miljara paseo, fariĝis unika urbo en nia lando: ĝi estis dufoje fondita.

Post la reĝa permeso kun febra ritmo kaj granda elano komenciĝis la rekonstruado kaj nia antikva urbo, simile al la mitologia Fenikso, rapide reviviĝis el siaj cindroj. Sed ankaŭ en tiu dua periodo de ĝia evoluo ĝi devis elteni pezajn provojn. La urbo grave suferis la 150-jaran turkan subpre-

mon kaj ĉar ĝia popolo estis ĉiam progresema, forte batalanta por libero kaj sendependo, ĝi donis multajn heroojn kaj martirojn dum la liberecmilitoj de Rákóczi (1707), Kossuth (1848/49) kaj por la hungara Konsilia Respubliko en 1919.

Plej forte efikis en ĝia historio tamen la definitiva deskuo de la faŝista jugo fare de la hungara popolo en 1945. Nia liberigo ebligis ankaŭ al Esztergom intense kaj rapide elkonstrui sian pli belan kaj rezultoplenan futuron.


Favore prezentis sin la urbo al la partoprenantoj de Hungara Kultur-festivalo en 1972. La gastoj propraokule vidis la pitoreskan situon de la urbo kun ĝiaj historiaj kaj artmonumentoj kaj en la fono la plej modernan loĝkvartalon harmonie adaptiĝantan al ĝia bela natura medio. Tamen ili ne havis ŝancon viziti alian trezoron de Esztergom, la preskaŭ centjaran Kristanan Muzeon. *Gia restaŭrado dumtempe finiĝis kaj en la jubilea jaro la muzeo malfermis jam siajn pordojn.* Indas la atenton tiu plej riĉa hungara provinca muzeo, speciale riĉa je frutempaj hungaraj kaj italaj bildoj, mezepokaj oleopentraĵoj sur faldeblaj altaraĵ lignotabuloj. Ilin konas la Eŭropa arthistoria literaturo, ili estis eĉ ekspoziciitaj inter 1965—1968 eksterlande en la urboj Neuchatel, Parizo, Krems kaj Londono. Por fini, ni mencias, ke inter la hungaraj majstroj troviĝas la plej elstara figuro, reprezentanto de tabul-pentraĵo el la malfrua gotika stilperiodo, kiu uzis la mansignojn MS, sed kies persono ĝis hodiaŭ estas anonima. (Li kreadis ĉirkaŭ 1506.)

JOZEFO MÁTEFFY

CIMKÉPUNK:  
A fordítóira lülelve.  
A TARTALOMBÓL:  
Bárczi Géza,  
Fekete Gyula,  
Garai Gábor,  
Jobbágy Károly,  
Karinthy Ferenc,  
Rákos Sándor,  
Sarlós István,  
Simon István  
írásai  
Az ürrepülés  
nyelvi problémái  
Moszkvai  
konferencia  
a nemzetközi  
nyelvről  
Hírek  
100 laphól  
Angol képviselők  
az eszperantóért

1973.  
október  
I. évf. 1. szám

Ára: 4 Ft



Post longjaraj planadoj kaj preparadoj en la pasinta jaro aperis la unuaj du numeroj de la dumonata hungarlingva magazino: „Eszperantó Magazin”, oficiala organo de Hungara Esperanto-Asocio. La revuo havas la subtitolon: Lingvo kaj Mondo.

Sur 32 paĝoj en dekmil ekzempleroj la nova magazino donas informojn por la vasta publiko — oni vendas ĝin surstrate — pri la lingvaj problemoj de la mondo kaj kiel solvon de tiuj, proponas la Internacian Lingvon Esperanto.

La redaktorado ĉe-kape kun Mihály Gergely, plenumis grandan taskon prezentante inde, multflanke la problemon.

En la unua numero oni povas legi pri enketo kiun partoprenis István Sarlós, ĉefredaktoro de ĵurnalo „Népszabadság” centra organo de Hungara Socialisma Laborista Partio kaj István Simon poeto, sekretario de Hungara Societo de Verkistoj. En la magazino aperis verkoj de renomaj hungaraj verkistoj, poetoj: Gyula Fekete (ĉian artikolon ni publikigas ĉinumere), Gábor Garai kaj Sándor Rákos.

Por la unua numero de la magazino verkis artikolon pri Esperanto, Géza Bárczi Kossuth-premiita akademiano. Kolomano Kalocsay sub titolo „El la memoroj de arttradukisto” publikigas interesajn facetojn de sia traduka laboro. Du interparoladoj estas ankaŭ menciindaj: kun la ver-

kisto Ferenc Karinthy, fare de Mihály Gergely kaj kun japana studento Hukaya Sitoŝi, fare de Marteno Fejes.

En la dua numero de la magazino, aperinta en Decembro, same bunte troviĝas interesaj artikoloj. Nur por mencii kelkajn: Interparolado kun poeto, arttradukisto György Somlyó sub titolo „Arttradukado kaj multlingveco”. En la serio „Nia portreto-galerio” interparolado kun la verkisto Sándor Szathmári.

La literatura parto de ĉi numero estas same riĉa: ni trovas novelon de Andor Endre Gelléri kaj poemojn de Károly Jobbágy kaj Béla Vihar. Du studoj meritas atenton unu pri Hungaria Esperantista Societo Laborista verkita de Zoltán Blau, kunlaboranto de Partiohistoria Instituto kaj la alia pri la obstakloj de la lernado de fremdaj lingvoj, verkita de adjunkto D-ro István Szerdahelyi. Sub la titolo „Lingvaj problemoj de science fiction”, oni povas legi fragmentojn el prelego de lingvisto, D-ro György Szépe.

En ambaŭ numeroj por la interesigantoj aperis lingvokurso redaktita de D-ro Ferenc Jáki. Sur du paĝoj aperas esperantlingve informoj kaj novaĵoj pri la Movado, kaj la enhavtabelo de la magazino. Humura rubriko, trafaj karikaturaj, krucenigmo same troviĝas kaj servas por la popularigo de nia laboro, emfazi la problemon de la multlingveco. La kunmetoj de artikoloj ĉerpitaj el hungar- kaj esperant-lingvaj gazetoj koncernas la saman temon.

Kiel vi povas vidi el tiu listigo, la magazino plenumas gravan mision. Espereble ĝi sukcesos popularigi nian Lingvon kaj Movadon kaj rezulte ni akiros novajn adeptojn. Por la redaktorado de la Magazino ni deziras forton kaj multajn rezultatojn!

L. RIETH

## Hungara Vivo aperos dumonate

Kiel vi memoras, ni jam publikigis la ĝojindan eventon, ke laŭ la deziro de niaj legantoj kaj redakta komitato Hungara Vivo aperos dumonate, do jare sesfoje. Bedaŭrinde en 1973 ne sukcesis aranĝi ĉiujn teknikajn kaj financajn cirkonstancojn.

Sed la redakcio nun povas anonci, ke estas preta la 1-a numero de 1974, numero pri la originala Esperanto-prozo, kaj redaktiĝas la 2-a numero, numero pri Hungario kiel inda turisma celo, kaj ĝi aperos ne fine de majo, sed pli frue, jam fine de aprilo.

Karaj Legantoj, vi tre bone konas la nivelon, eblecon de esperantaj gazetoj. Estas tre-tre grava temo por nia movado, sed ni devos paroli pri ĝi aliffoje. Vi scias, ke ankaŭ la Esperantaj gazetoj povos prosperi, se ili havas sufiĉan intereson, atenton, ĉefe: sufiĉajn abonantojn. Tial ni petas, se laŭ via opinio Hungara Vivo estas inda je atento kaj intereso, bonvolu rekomendi ĝin ankaŭ al viaj konatoj, amikoj.

La titolo de nia revuo estas: Hungara Vivo, sed ĝia enhavo jam ekde jaroj estas pli vasta, kaj en ĉi tiu jaro el ses numeroj tri numerojn ni redaktos — ekzemple — pri la originala prozo, poezio kaj dramo de Esperanto.

Redakcio



# GEPATRA LINGVO DE LA EGALRAJTECO

Antaŭ nelonge mi partoprenis internacian renkontiĝon de verkistoj, kies oficialaj lingvoj estis la franca kaj angla, kaj kie ankaŭ alparolis kaj diskutis en siaj gepatraj lingvoj la partoprenantaj germanaj kaj aŭstria verkistoj, ankaŭ la rusaj kaj kelkfoje la italiaj. La terenon regis du-tri tradukistoj havantaj universalan talenton. Ili tradukis la alparolojn tien-reen, dume eble la plej granda parto de la verkista publiko esperperde provis deĉifri la sencon de la forflugaj frazoj, aŭ ĉeestis nur kun spasma enuo senfare.

Ĉe la sojlo de la paca kunekzistado — laŭespera — la travivaĵo de tiu marborda konferenco ne estis tro entuziasmiga.

Kaj ne nur pro tio, ĉar okaze de tiaj internaciaj renkontiĝoj mi ĉiam devas senti la hermetikan izolitecon de la hungara lingvo, kaj ankaŭ ne pro tio, ĉar nenium fremdan lingvon mi parolas, komprenas bone. Simple: mi sentis min *subordonita*, kaj tiun senton ne povus forigi se mi parolus eventuale eminente eĉ tri-kvar mondlingvojn. Ĉar eminente paroli angle aŭ france, aŭ diskuti kun anglo aŭ franco en iliaj *gepatraj* lingvoj pri komplikaj principe-teoriaj, estetikaj demandoj — tiuj du aferoj apartenas al malsamaj kategorioj de valoro. Ja diskuti eĉ en sia gepatra lingvo nur malmultaj povas *egalrajte*, ja por la nuraj argumentoj la konvinkan forton, la validigan pluson donas ĉefe la precizeco, trafeco, spriteco, forteco kaj vigleco de la formulado.

Tiuj kiuj estas posedantoj de iu mondlingvo denaske, juĝas memkomprenebla paroli en sia gepatra lingvo okaze de tiuj — ne severe oficialaj — internaciaj renkontiĝoj. Tiuj kiuj alparolas ne en siaj propraj gepatraj lingvoj, ne povas liberiĝi de lingvaj kliŝoj, banalaĵoj, sensecaj frazismoj, de la senkarakteraj, bombastaj formuladoj. Kaj tiuj kiuj uzas tradukistojn — tiuj eĉ pli ne povas liberiĝi.

Estas plene kompreneble, ke neniuj mondlingvoj rezignas pri sia tereno heredita, sed eĉ, se estas eble, ĝi akiras pluajn teritoriojn konkereblajn. De tempo al tempo malaperas aŭ fariĝas formala eĉ la oficiala lingvo de la — ne diplomaciaj, ne rigore oficialaj — internaciaj konferencoj. Se tiuj estas sufiĉe mondkalaj, la partoprenantoj eĉ pro prestiĝaj motivoj ne akceptas tiajn regulojn.

Estus jam bezonata la posedo de tri-kvar mondlingvoj — eĉ nur por esti inter la vicoj de la aŭskultantaro — por simila homo kiel mi estas, venki la kompleksojn de malsupereco. Sed sur la podio eĉ tiam ĝi ne estas venkebla.

Do multiĝas inter la partoprenantoj venintaj el ĉiuj monddirektoj, kiuj ne sentas — eĉ neniam sentis — tian kompleksojn de malsupereco. Kaj ĝenerale multiĝas la kvar-kvin lingvaj konferencaj reprezentantoj — aparte *profiligataj* por tiu celo — de la literaturo, artoj, sciencoj, metioj.

Okaze de tiu marborda konferenco denove mi devis senti, kion mi jam multfoje sentis: sola *gepatra lingvo* de la internacia kunlaboro, kiu sen hereditaj privilegioj, avantaĝoj kaj malavantaĝoj, *teorie kaj praktike same pure* povus dokumenti la homan egalrajtecon, povus esti nur: Esperanto.

Mi pripensas, kiel nekredible freŝigus la spiritan spertoŝanĝon, se gravaj informoj devenantaj el iu ajn parto de la mondo, *per unu sola lingva transliverado* povus atingi iun ajn alian punkton de la mondo ĝis la interesiĝantoj, eĉ mi povas koncepti tiel: al *amaso* de la interesiĝantoj. Bone elektitaj raportoj pri la spirita vivo, pri la plej novaj rezultoj de la artoj, sciencoj, pri iliaj tendencoj, diskutoj; recenzoj de gazetoj, revuoj, sciigoj pri libroj kaj artikoloj, tradukoj el la originalaj lingvoj — kion signifus tio hodiaŭ, en la erao de la homa paca alproksimiĝado, de la scienc-teknika revolucio. Do se Esperanto fariĝus,

kiel ankaŭ la plej taŭga: gepatra lingvo de la internacia spirita spert-interŝanĝo.

Mi pripensas, kion signifus se nur en du-tri landoj la lingvon Esperanto oni levus sur la pozicion de la *dua lingvo*. Kion tio signifus por la koncernaj landoj por solvi la problemon de la internacia izoliteco, por la fremdul-trafiko k.t.p. Kaj kion signifus ankaŭ por la lingvo Esperanto, se finfine ĝi povus aparteni al geografiaj, etnaj grupoj, landoj, kiel la lingvoj naciaj. Ja sur la vojo, sur kiu Esperanto povus evolui ĝis iĝi mondlingvo, tiu estas eble la plej kruta ŝtupo.

Nu laŭorde: tiuj estas grandparte hodiaŭ nur iluzioj. Sed ŝajnas al mi, ke starti por tiu plej kruta ŝtupo jam estas tempo.

Estiĝus ekzemple „esperantistaj urboj”, laŭ la normoj difinitaj de la Universala Asocio.

Tiu urbo — urbeto, ripozloko — kiu igus la lingvon Esperanto sia dua lingvo, ricevus de la Universala Asocio tiun kvalifikon, laŭplaĉe: *rangon*. Se ekzemple en ĝiaj lernejoj kaj ankaŭ ekster la lernejoj kun aparta atento oni organizus la lingvokursojn, se per Esperanto-lingvaj prospektoj, surskriboj, vojmontraj tabuloj oni akceptus la fremdulojn.

Tiuj kvalifikitaj urboj estus signifitaj sur la mondmapo de la esperantistoj; ili, vojaĝante tiudirekte, jam pro tio vizitus tiujn urbojn, naturajn mastrojn de la esperantistaj renkontiĝoj, tendumadoj, ekskursoj.

Finfine ili iĝus interesataj por kiel eble plej zorgeme konstrui la bazojn de la Esperanto-Movado.

Cu tio estas iluzio?

Mi ne kredas. Se nur dek tia-specaj urboj estus markitaj sur la mapo de l'mondo, kies gvidantaro ekvidus en tiu ebleco la perspektivon, la fantazion — tio estus sufiĉa por la starto.

Tr. Ladislao RIETH



Vidvino de Béla Bartók — Foto de Károly Gink

**D**e post la diluvo ĝis nuntempe kaj ankoraŭ longe la simbolo kaj la metaforo de paco estas la olivbranĉ-portanta kolombo. Nun ĝi volas rakonti mallongan historion sen ia eltrovo aŭ aldono. Mi vidis ĝin per miaj propraj okuloj. En komparo kun mia longa vivo ĝi eĉ ne, okazis antaŭlonge kaj dum la pasintaj tagoj eble la centan fojon mi rememoris ĝin.

Estis tagmeze, ĝuste la tempo por tagmanĝo. Neniu iradis sur la korto. La vento ĉesis kaj brila sunlumo vibrigis la silentan aeron. Tie, dorsapoge kontraŭ ombra flanko de grenejo, mi ripozis, tre trankvile, tre maldorme.

Mi havis neniom da ĉagrenoj aŭ ĉiuj estis tre malproksimaj. Vidalvide, el la ĉirkaŭbarita kortbirdejo aŭdiĝis la kvivitado de plurcentoj da kokidetoj. Eĉ ĉi tio formis nur parton de la silento.

Tuj fulmorapide kaj neatendite, kun impeta flugil-klakado, kolomboj sin ĵetis en la aeron, de sub la tegmento-rando de la grenejo kaj de ĉiuj flankoj. Kelkaj estis tiel proksimaj al mi, ke la vento de la flugiloj atingis mian vizaĝon. Flugis svarmo ankaŭ el la

József Lengyel

## KOLOMBOJ

kolombejo kaj eĉ pli de la direkto de la stalo. Mi neniam sciis, ke tiom da kolomboj estas ĉi tie. Neniu povus nombri, kiom ope ili estis kaj ĉiuj rondiris en la proksimo.

Ne homo fortimigis ilin tiel, nek povis esti rabobesto, nek estis knalo de pafilo. Se estus estinta tio, ili flugus malproksimen en la sekurec-promesan distancon, kie iliaj impete pulsantaj koretoj povas kvietiĝi. Sed ĉiuj restis super la kokidetoj, kiuj tie malsupre sur la kvarangula dratbarita korto bekis, pepis kaj kelkfoje pinĉis unu la alian.

Cirkle-cirkle siblosusuris la kolomboj, kvazaŭ vortico ensuĉus, ĵetus kaj turnadus ilin, kvankam ili mem estis tiu ĉi kirlo. Pli supren, pli malsupren, unufoje malleviĝante preskaŭ ĝis la barilo kaj supreniĝante dekoble pli alten ol la tegmento, ili densare krucis la vojon unu de la alia en komplikaj arkoj.

Eble jam unu minuton mi ri-

gardis tiun kirliĝantan kaj tamen regulforman funelon — unu minuto tiaokaze ne estas mallonga tempo. Sed nur tiam mi ekkomprenis, kio estas la kaŭzo de la malkvietiĝo de la kolomboj, kiam mi levis miajn okulojn pli supren.

Supre, en la sennuba tagmeza alto nizo giris kun etenditaj flugiloj super la kokidetoj, timige malrapide, kun elkalkulita precizeco. Jam estis la momento, kiam ĝi fermos siajn flugilojn kaj kiel unghava, hokporta, ega peza ŝtono falos sur la elektitan predon. Sed tie inter ĝi kaj la predo estas la kolomboj. Ilia amasiĝinta aro igas zigzagi la sondoplumbon de ĝiaj okuloj.

La nizo dum iom da tempo ankoraŭ rondiris super la kokidetoj, poste, per po unu bato de siaj ŝajne pigraj flugiloj, ĝi foriris, fariĝis eta punkto kaj malaperis.

Tiom estas la tuto. Kelkfoje tiaj estas la kolomboj. Mi prisilentas la sublimajn komparojn, por ke per nubozaj kaj afektite patosaj vortoj mi ne venu super la kolombojn.

Tr. Eva kaj Bernard GOLDEN



CSOKONAI LILLA  
MEDALOJ DE ERIKA LIÇETI



MIHÁLY CSOKONAI VITÉZ

AL LA ESPERO

Ĉielaj' ludanta  
kun la fil' de l'ter',  
ho, vi, blinda, vanta,  
ŝajna di', Esper',  
kiun kreas plore  
ni en la danĝer',  
kredas klinhonore  
estis gardanĝel',  
kial venas vi glat-buŝe  
kun sennuba rid',  
kial ĉarmas vi flat-tuŝe  
min per duba fid'?'  
Ĉesu! Vi posedis,  
vi instigis min,  
vi, dum mi vin kredis,  
mistifikis min.

Plantis narcisgarbojn  
vi en mia kort',  
per fontet' la arbojn  
savis vi de mort',  
vi printempon ŝutis:  
florojn mil al mi,  
ĝoj' ĉiela gutis  
spice pli kaj pli,  
pensoj en la freŝa fruo,  
kiel la abel',  
flugis per la venta fluo  
al la roz-miel'.  
En feliĉo brila  
jam ne mankis pli  
ol la kor' de Lilla,  
kaj ĝin donis Di'.

Sed ve, jen ne verdas  
miaj arboj plu,  
rozoj freŝon perdas,  
sekas fontoflu'.  
Mia belo Maja  
iĝis vintra nub',  
viv' antaŭa, gaja  
iĝis cindra rub'.  
Ho nur Lillan vi plu donus,  
nur ŝin, ŝin en sol',  
en lamentoj nun ne dronus  
kanto sen konsol'.  
En brakum' konsolojn  
trovi sciis mi,  
kaj la perlokronojn  
ne envidus mi.

For, Espero flata,  
for jam, trompistin',  
ja ĉi krudo fata  
enterigos min.  
Plu mi ne aspiras:  
la anim' pro lac'  
je l'ĉiel' sopiras,  
korp' je tomba pac'.  
Por mi jam la kamp ne floras,  
ne odoras nun,  
bosko trile ne sonoras,  
nokten dronas sun'.  
Sorĉaj sonoj trilaj,  
bunta fantazi',  
gaj', esperoj, Lillaj,  
adiaŭas mi.

AL ROZBURĜONO

Floru kun ridet' afabla,  
rozburĝono, floru jam,  
jen la vaga vent' agrabla  
volas kisi vin kun am'.

Floru, floru, roz' odora,  
Heba venas kun nektar',  
vian korpon virgan Flora  
kovros per velur-talar'.

Kiel brilos kaj parados  
la ĝarden' per via pomp',  
kiel oni sopirados  
preni vin per branĉo-romp'.

Mi vin prenos, dolĉa, eta  
rozburĝon': vi belas jam,  
ja ĉiu knabin' koketa  
volus vin por brust-ornam'.

Sed ne, knabinet' alia  
vin ne fiksu ĉe l'korset',  
por vi plantintin' Julia  
estu nova ĝardenet'.

Tie vete rozkoloru  
ĉe l'pli rava rozkolor',  
tie vete bonodoru  
ĉe l' pli bela bonodor'.

Tr. Kálmán KALOCSAY

*Mihály Vitéz de Csokona, granda hungara poeto de la 18-a jarcento, naskiĝis antaŭ 200 jaroj. Li komencis sian vivovojon kiel gimnazia magistro, sed li estis eksgita el diversaj kaŭzoj aŭ pretekstoj, verŝajne pro politikaj motivoj en la tiam politika atmosfero de subpremo sekvinta la klerismon de Jozefo II. De tiam li ne havis plu daŭran postenon, kaj vivi el poezio tiutempe estis aventura kaj mizera vagabondado de unu gastiganto al alia kaj povis konduki nur al frua morto.*

*Li verkis poemojn, komikan epopeon, komediojn, multe tradukis precipe el Metastasio. Plej konataj kaj ŝatataj fariĝis liaj poemoj, precipe liaj ampoemoj al Julia Vajda, kiun li nomis Lilla en sia poemciklo. Ĉi tiuj poemoj, pasantaj el feliĉo al malfeliĉo, kun sia leĝera rokoko-ĉarmo, virtuoza versarto, dolĉaj eĉ en pleja tristo, estas ĝis nun trezoroj de la hungara amliriko. Li verkis ankaŭ poemojn popoleskajn, do estas rigardebla kiel antaŭulo de Sándor Petöfi.*

# ĈIRKAŬAĴO-PROTEKTO KAJ AKVOMASTRUMADO EN HUNGARIO

La biosfero, aŭ komunlingve dirite: la ĉirkaŭaĵo de la homo estas tiu parto de la naturo, kie la vivo, inkluzive la homon, ekzistas. Kiel protekti ĉi tiun ĉirkaŭaĵon, estas traktate nuntempe ĉie en la mondo. La kaŭzo de la diskutoj estas ne ia kurtaviva modo, sed la fakte eĉ jam okulfrapa danĝero, kiu pro la eksplodeca evoluo teknika pli kaj pli minacas la ĉirkaŭaĵon, do la eblecon de la vivo mem.

„La unuan fojon en la vivo de la homaro ni estas atestantoj de la disvolviĝo de tia mondkrizo kiu koncernas kaj la evoluintajn kaj la evoluantajn landojn; temas pri la krizo de la homa ĉirkaŭaĵo” — diris U Thant en la 17-a sesio de la Ekonomia

kaj Socia Konsilantaro de la Unuiĝintaj Nacioj. — „Se la nunaj tendencoj daŭre restas, ... endanĝerigos la estonto de la vivo sur la terglobo. Do urĝe necesas voki la atenton de la mondo al la problemoj kiuj povas obstakli la homaron vivi en ĉirkaŭaĵo ebliganta la realigon de siaj plej alt-ordaj klopodoj.”

Jes! La homaro devas esti skuata pri la danĝerigo minacanta ĝian vivon. La protekto de la ĉirkaŭaĵo ne estas ia mallarĝskala scienca programo aŭ simpla komplekso de certaj administraciaj ordonoj. Ĝi devas fariĝi programo movanta la tutan socion.

## ORIGINO DE LA MALBONO

Dum la evoluo de la homaro ĉiam kreiĝis ia ekvilibro inter la teknika evoluo kaj la homa ĉirkaŭaĵo. Sed en nia jarcento la evoluo tiom plirapidigis pro la dua scienca-teknika revolucio, ke la spontanea ekvilibriga protektado de la socio jam ne povas aŭtomate simultaniĝi. Direktata agado malspontanea necesas ankaŭ pro tio, ke la aŭtomata socia rekono de la danĝeroj kutime okazas tre malfrue.

Ĝis nun la ĝenerala malpurigo de la ĉirkaŭaĵo atingis minacajn gradojn ĉefe en la industrie evoluintaj landoj. Fortimiga ekzemplo estas la rivero Ruhr kies tuta fluo estas kvarfoje utiligata por industriaj celoj ĝis kiam ĝi atingas la Rejnjon; ĝi praktike iĝis kloako. La akvo estas pumpata disde 220 kilometroj por Nov-Jorko kaj disde 350—400 kilometroj por Los-Anĝeleso, ĉar la rekta ĉirkaŭaĵo de ĉi tiuj urboj iĝis tute malpurigita.

Hungarujo estas ankoraŭ ĉe la komenco de la intensa industriiĝo, do ĝi havas la ŝancon por la ĉirkaŭaĵo ne tiom katastrofe malboniĝi. La ĉefa malfacilo estas ke pro la altgrada bezono por in-

dustriigo estas nefacile bremsi la ĉirkaŭaĵo-malbonigajn investojn.

El inter la faktoroj karakterizantaj la ĉirkaŭaĵon la plej grava estas la akvo. La evoluo de la sidlokoj kaj la formiĝo de la ekonomia historio de la unuopaj landoj estis ĉiam en plej strikta rilato kun la ĉeesto de la akvo.

Sur la nuna nivelo de la socia kaj ekonomia evoluo la lukto por la akvo kaj kontraŭ la damaĝigaj fortoj de la akvo iĝas ĉiam pli akra kaj al ĉi tiu zorgo aldoniĝas en nia erao la timiga malpurigo de la ĉirkaŭaĵo kun tiu de maroj, lagoj kaj riveroj. Vana la enorma akvoamaso (1,3 miliardo da m<sup>3</sup>) de la Tero, se nur ties 0,5 procentoj estas senpere utiligebla nesala akvo, kies signifa parto eĉ estas malpurigita. La malpurigo fundamente ŝanĝas la enakvan vivon, la larĝ- kaj mallarĝsence konsideritan homan ĉirkaŭaĵon. Krom la malpurigo ankaŭ la manko de la akvo signifas kelkloke gravajn problemojn, ĉar — kontraŭe al la aero kvante ĉie egale disponebla — la akvo havas nehomogenan distribuon laŭ tempo kaj loko.

## RILATO DE LA AKVOMASTRUMADO AL LA NATURA KAJ SOCIA-EKONOMIA ĈIRKAŬAĴO

La cirkulado de la akvo en la naturo estas fakte la natura procezo de la reproduktiĝo de la akvo.

Sed se parto de la akvo estas allevita el la natura cirkulado kaj direktita al iu artefarita vojo por industria aŭ agrikultura utiligo, iaspeca dua cirkulprocezo elformiĝas: tiu estas la cirkulado de la akvo en la socio. La kielo de ĉi tiuj du cirkulprocezoj, iliaj interefikoj kaj efikoj al la socio estas determi-

nanto en la formiĝo de la homa ĉirkaŭaĵo, en la homa ekzistado, en la tera vivo.

La homo — por influi favore la biosferon — devas interveni en ambaŭ cirkulprocezoj. Per reguligo de la unua cirkulado la celo estas plibonigo de la natura cirkonstancaro de la akvo, pligrandigo de la utiligebla akvohavaĵo, reguligo de la defluoj, malkreskigo de la ofte detruifikaj superakvegoj.

Koncerne la duan cirkuladon la tasko estas provizi la necesan kvanton kaj kvaliton de akvo por la diversaj sociaj-ekonomiaj procezeroj, antaŭ ĉio por la vivularo, poste zorgi pri sendamaĝa rekonduko de la uzitaj akvoj al la naturo. En Hungarujo ĉiujare 5 miliardoj da m<sup>3</sup>-oj da akvo aliras la loĝantaron, industrion kaj agrikulturon, ebligante iliajn viv- kaj produktfunkciojn, sed samtempe 1,2 miliardoj da m<sup>3</sup>-oj da malpurigita akvo ŝarĝas la naturajn "vivajn" akvojn.

## ĈIRKAŬAĴO-PROTEKTAJ TASKOJ DE LA AKVOMASTRUMADO

La kontraŭ-malpuriga protektado de la akvoj iĝis elstara tasko de la akvomastromado, kies diversaj branĉoj same servas — rekte aŭ nerekte

— la protekton kaj formadon de la homa ĉirkaŭaĵo. Ekzemple tiaj estas:

— la celhava mastromado pri la akvohavaĵo por teni la biologian ekvilibron de la naturo


— protekto de la natura kaj artefarita ĉirkaŭaĵo de la homo disde la damaĝefikoj, detruoj fare de la akvoj

— formado de la homa ĉirkaŭaĵo per la iloj kaj metodoj de la akvomastromado, per la evoluigo de la reto de la hidroteknikaj objektoj.

## PROTEKTADO DE LA ĈIRKAŬAĴO KONTRAŬ LA DAMAĜEFIKOJ DE LA AKVO

En Hungarlando la grandaj akvomastromaj laboroj celantaj formadon de la ĉirkaŭaĵo komenciĝis en la antaŭa jarcento per la regulado de la grandaj riveroj. Sur la teritorioj drenitaj kaj per digo ŝirmataj formiĝis nova, pli homa, ekonomie pli utila ĉirkaŭaĵo. Ĉi tie vivas 30%-oj de la tutlanda loĝantaro kaj havaĵo valora ĉ. 300 miliardoj da forintoj estas koncentrita. La responseco pri ties ŝirmo kaj pluevoluigo evidente kreskis pli granda.

Dum la lastaj 10—15 jaroj konsiderindaj teknikaj klopodoj okazis por kreskigi la sekurecon, tamen la ŝirma kapablo de la kontraŭinundaj objektoj restas malantaŭ la kreskintaj prisekurecaj postuloj. La homa agado en la akvokolektaj basenoj rezultigis ke sanĝiĝis la hidrologiaj cirkonstancoj, plirapidiĝis la kolektiĝo de la pluvaĵoj, la supro de la superakvegoj iĝis pli alta ol antaŭe. Evidentas ke la kontraŭinunda digaro estas plu evoluigenda kaj la riverfluejoj estas korektendaj por plibonigi la naturan transportadon de la akvo kaj glacio.




La Danubo ĉe Visegrád

Same estas evoluigenda la drena kanalaro kaj pum-pilaro ĉar eĉ nuntempe 20—25% de la malaltaj terenoj estas inundita de internaj akvoj por iom longaj periodoj. Ankaŭ oni devos pli bone utiligi la pluvajakvon per estigo de lokaj rezervujoj kaj per apliko de konvenaj agroteknikaj metodoj. En la montaj kaj montetaj regionoj la erozio devas esti tute ĉesigita kaj ĉiu akvo rezervita.

Jen la taskoj de la ĉirkaŭaĵo-protektado en la akvomastromado kaj la agro- kaj arbarkulturo.

Rivereto en Esztergom



## FORMADO DE LA ĈIRKAŬAĴO KAJ LA AKVOMASTRUMADO

Jam la simpla ĉeesto de la akvo estas decida pri la ĉirkaŭaĵo. La jam konstruitaj kanaloj, kiel la Orienta Ĉefkanalo, la reguligitaj riversekcioj, la naturaj lagoj kiel Balatono aŭ la lago ĉe Velence kaj iliaj prikonstruitaj bordzonoj estas novaj ri-pozteritorioj por la homo, same kiel la artefaritaj valrezervujoj en Borsod (boršod) aŭ en la valo de

Gaja, aŭ la nun estiĝanta 120 kvadratkilometra artefarita lago super la baraĵo de Tisza (tisa) ĉe Kisköre. En la estonto ankaŭ la Tisza-baraĵo ĉe Gsongrād (ĉongrad), la akvoenergiostacioj sur Danubo, kaj la kanalo inter Danubo kaj Tisza kontribuos al la nova pejzaĝo de nia lando kaj estos parto de la sane transformita ĉirkaŭaĵo.

## PROTEKTADO DE LA AKVOJ KONTRAŬ MALPURIĜO

La akvoj uzataj kaj malpurigitaj en la dommastrumaĵoj, industrio kaj agrikulturo damaĝe reefikas la naturajn akvojn, ties vivularon kaj reuzeblecon. Pro tio — dum la lasta jardeko — ankaŭ en Hungarujo la plej grava tasko de la akvomastromado iĝis la kontraŭmalpuriga protektado kaj la prikvalita mastromado de la akvo.

Post kelkjaraj malkovraj laboroj la hungara registaro okupiĝis pri la situacio de la akvomalpurigado en 1961, kaj globale ordigis la akvokvalitoprotektadon — komenciĝis nova etapo en la akvomastromado, ne nur en la kadro de la Tutlanda Akvoafera Direktorejo sed en bone kunordigita kunlaboro kun ĉiuj koncernaj ministerioj, institucioj, entreprenoj. La nova akvoprotekta sistemo bezonis solvon de teknikaj, administraciaj, juraj, ekonomiaj kaj organiza problemoj. Ne nur la metodoj kaj iloj de la kontrolo kaj plibonigo de la akvokvalito de-

vis esti ellaboritaj sed ankaŭ instigiloj, kiel la progresiva monpuno por malpurigo de naturaj akvoj, sistemo de pagoj por diversaj akvoutiligoj ktp. Ĉi tiuj aranĝoj helpis la estigon de purigaj instalaĵoj kaj kondukis al tia industrio-lokiga politiko kiu konsideras ankaŭ la hidrologian fonon. Ĉe 12 regionaj akvoaferaj direktorejoj oni nun establas organizojn por preventi damaĝojn senatende sinmontrantajn.

Fakte la aranĝoj jam faritaj en Hungarujo estas tre signifaj, tamen la koncernuloj ne estas kontentaj. Ĉiam estas serĉataj metodoj, iloj, per kiuj la akvomastromado povas favore efiki la homan ĉirkaŭaĵon, eĉ se pormomente la ekonomieco malkreskas aŭ la amortizacio plilongigas. En la socialismo ja ĉio okazas por la homo, por la plibeligo, plifeliĉigo de lia vivo. (X)



La Parlamentejo en Budapeŝto

# Pri la mondfamo de la hungaraj ĥoroj

En la 2-a numero de la jaro 1973 mi raportis per kelkaj vortoj pri la internaciaj sukcesoj de la hungaraj ĥor-ensembloj. Mia raporto menciis nur la rezultojn de la lastaj du jaroj, tamen la internaciaj distingoj kaj premioj de la hungaraj ĥoroj estis multaj kaj rimarkinde altaj.

De tiam mi renkontiĝis kun samideanoj kaj ne-samideanoj, kiuj demandis min, *kio povas esti la kaŭzo de la tutmondaj sukcesoj de l'hungaraj ĥoroj?* Per miaj jenaj linioj mi klopodas respondi al ĉi tiu ege interesa problemoj.

La nova kaj ĉie konata hungara muzikkulturo kroĉiĝas al du eminentaj muzikaj geniuloj: Béla Bartók kaj Zoltán Kodály. Inter ili Bartók fariĝis unu el la plej grandaj instrumentaj komponistoj de la nuntempa mondo kaj Kodály kreis internacie faman ĥor-kulturon, kiu fariĝis ekzemplo por ĉiu moderna kanto-kulturo.

Kompreneble, la hungara muzik-historio de nia jarcento ne nur pro tio kondukis al la mondfamo, ĉar Bartók kaj Kodály agis kiel muzikaj geniuloj — sed kontraŭe: ankaŭ pro tio, ĉar ili ambaŭ bone ekkonis la tendencojn de la muzikhistorio kaj laboris laŭ ili. Ĉi tio signifas, ke ili bazis sian arton sur la hungaran popolkanton, pli ĝustadire sur la hungaran kamparanan kanton.

La sintenon de Bartók kaj Kodály al la vera hungara kamparana kanto bone karakterizas eldiro de Bartók: „Laŭ mia konvinko ĉiu de niaj veraj t.n. striktasencaj popolaj melodioj estas fakte idealo de la plej altranga arta perfekteco. En ĝia malgrandeco ĉiun mi rigardas ĝuste majstroverko, kiel en la mondo de la pli grandaj formoj fugon de Bach aŭ sonaton de Mozart.”

Bartók kaj Kodály en ĉi tiu senco komponis siajn majstroverkojn. Ili rigardis la verajn kaj ne falsitajn popolmelodiojn kiel siajn proprajn verkojn kaj laŭ ĉi tiu ili uzis ties muzikteman valoron.

Kodály estis ne nur genia komponisto kaj epokfara scienculo, sed ankaŭ bonega pedagogo; la plejparton de la hodiaŭ mezaĝaj hungaraj komponistoj li instruis pri komponado, transdonante al siaj lernantoj ne nur scion, sed samtempe entuziasmon al la ĥor-komponado kaj oferemo, celante evoluigi la hungaran muzik-kulturon. (Interese estas, ke Bartók neniam instruis komponadon; li tamen faris skolon, vivantan en la in-

ternacia muzika kulturo ĝis niaj tagoj.)

Krom ĉio, kion mi menciis, Kodály estis bonega organizanto. Jam en la 30-aj jaroj de nia jarcento li iniciatis movadon kun nomo, kiu estas samtempe programo: „Kantanta junularo”. Lia konvinko estis: se oni ne akiris en la frua juneco certan nivelon de la muzikkulturo, en la plena aĝo ĉi tio jam ne estos ebla. La plej grava celo de la movado estis organizi bonajn junularajn ĥor-ensemblojn, plejparte en la lernejoj, sub la gvido de inteligentaj kaj talentaj dirigentoj.

Ĉi tiu movado ne estis tre longedaŭra; tamen de ĉi tiu tempo en Hungario ĉiam estis kaj vivis ia formo de ĥor-kultura movado, daŭrigante la bonajn tradiciojn, elirantajn de Kodály.

La politikaj kaj sociaj cirkonstancoj de Hungario inter la du mondmilitoj, dum la Horthy-reĝimo, ne estis taŭgaj subteni kaj fortigi humanisman muzikkulturon. Bona kaj perspektivo-dona socia situacio ek-estis en nia lando nur post fino de la dua mondmilito, post liberiĝo el la faŝismo. Kiel rezulto de la neniam paŭzantaj ĥor-movadoj, ĝis tiu tempo la hungaraj ĥoroj — kun ili la kantistoj, dirigentoj, komponistoj — atingis altan artan nivelon kaj povis jam prezenti sin en la komunumo de la internacia — eŭropa — muzikkulturo.

Kodály kaj la aro de multaj liaj adeptoj, ĥor-komponistoj, komponis multajn valorajn ĥor-verkojn, kiuj samtempe edukis novan kantokulturon en Hungario, novajn ĥor-gvidajn metodojn. La altrangaj muzik-verkoj postulis altrangajn prezentmanierojn, neceson ellerni novajn intonaciojn, ritmojn ktp.

La nove kreita muzika mondo baziĝis sur la strikta kunligo kun la hungara popolmuziko, kiu transformis la guston de la kantistoj kaj samtempe tiun de la publiko. Ne estas mirinde, ke en la tuta mondo, kie oni volas evoluigi la ĥor-kulturon, la ĥor-gvidantoj turnas sin al la verkaro de Kodály kaj de liaj adeptoj. Dum multnombraj ĥoraj festivaloj kaj konkursoj aŭdinte la kantadon de l'hungaraj ensembloj, la ĥor-gvidantoj ege klopodas akiri muziknotojn de la hungaraj komponistoj. Ili bone scias kaj neniam neglektas la faktan, ke la sukcesoj de la hungaraj ĥoroj ne lastvice baziĝas sur la novstilaj kaj altnivelaj

hungaraj komponistoj. Ĉiu fakulo bone rekonas, ke ĉi tiuj verkoj havas multvaloran edukan forton. Vere, ke la tekstoj plejparte ne povas esti senmanke kaj el arta vidpunkto bone tradukataj en fremdajn lingvojn; pro tio la hungartekstaj ĥor-kompozicioj estas kantataj eĉ en fremdaj landoj en la originala lingvo. Estas fakto, ke ankaŭ la hungaraj ensembloj klopodas prezenti la kantatajn verkojn sen traduko t.e. en la originalo. Jen ekiro de kutimo, kiu certe fariĝos post iom da tempo tradicio: prezenti la komponiciojn en la originala lingvo, sen traduko. Ĉi tiun principon akceptas pli kaj pli eksterlandaj, internacie famaj ĥor-ensembloj.

Estas klare, ke Kodály per siaj verkoj kaj organiza agado edukis indajn reprezentantojn de nova muzika percepto. Sed ĉi tio estis nur tial ebla, ĉar li mem edukis sin akceptante la veran hungaran popolmuzikon sia gvidilo. Kiel la mitologia Anteo, ĉiam, kiam lin tuŝis la patrino tero, la popolmuziko, li fariĝis pli kaj pli forta kaj nevenkebla.

D-ro Lajos LESZNAI

## RECENZO

*France Prešern: Girlando da Sone-toj.* Poemaro. 43 p. Trad.: Jozefo Velebit. Eldono de la Tradukinto. Prezo neindikita.

Kiel la informriĉa antaŭparolo malkaŝas, *France Prešern (1800—1849)* estas elstara figuro de la slovena romantismo, kiu levis la slovenan literaturon al Eŭropa nivelo. La forma bravaĵo, prezentita en tiu ĉi volumeto, tamen malmulte impresis min: ĝi estas bela poemo, pri-verkanta la patruj-amon, sed enhavas malmultan komuninteresan spicon. Krome, ankaŭ la tradukinto ne povis solvi kontentige sian — cetere ekstreme malfacilan — taskon. Stariga la demando: ĉu entute estas inde penadi pri la traduko de similaj esence formaj bravaĵoj? La versoj elspiras laborator-odoron, kaj mi bedaŭras la tempon, kiun Velebit foruzis por tiu ĉi laboro — lian talenton mi lernis respekti laŭ la originalaj poemoj en *Reeĥoj* kaj publikaj aperintoj sur la paĝoj de *La Suda Stelo*.

V. B.

# Géza Bárczi jubileas

## Vizito ĉe la historiisto de la hungara lingvo

En la nordo de Buda, en bela ĝardenkvartalo inter villoj staras modesta domo. Tie loĝas Géza Bárczi, la granda majstro de la esploro kaj historio de l' hungara lingvo, jam de 50 jaroj en la medio de la naturo kaj de libroj. Li naskiĝis la 9-an de januaro 1894 en Zombor, en la sudo de la tiama Hungario (nun en Jugoslavio). La belan hungaran lingvon, kiun li parolas kaj kultas, li lernis de sia patrino deveninta el Ipolyság (nun en Slovakio), kie oni parolas la hungaran tre bel-idiome. Li estas membro de la Hungara Scienca Akademio, em. univ. profesoro de la hungara lingvistiko, posedanto de pluraj altaj distingoj. Liaj studoj, disertacioj, libroj estas bazaj verkoj por la plej diversaj branĉoj de la hungara lingvistiko, ekz-e Etimologia Vortaro, La Deveno de la Hungara Vortostoko, Biografio de la Hungara Lingvo, serio de lingvistikaj studoj ktp.

Enpaŝinte en lian loĝejon, oni vidas librojn, librojn, librojn. Por ili ne sufiĉas la libroŝrankoj, ili stokiĝas sur tabloj, seĝoj, eĉ sur la divano.

Post reciproka saluto, interesiĝo pri farto mi demandas:

— *Cu vi ankoraŭ laboras en la universitato?*

— Certe, mi prelegas tie kaj partoprenas la prilaboradon de kelkaj temoj de la lasta hungaristika konferenco.

*Mi pensas, ke jen, la aĝon ne difinas la jaroj: kun tiom da laboremo, laborkapablo, multflanka interesiĝo oni estas juna, kion ajn diru la kalendaroj.*

— *Cu vi permesas demandon: kiel vi fariĝis lingvisto?*

— En la gimnazio mia biologio-profesoro animis min pri natursciencoj, precipe pri botaniko; tiam mi volis esti natur-esploristo.

— *Iam vi rakontis, ke jam tiutempe vi ekkonis E-on kaj ĝin lernis tre rapide...*

— Jes. Kaj mi aldonas, kiel mi jam skribis tion en *Eszperantó Magazin*, ke precipe la unuan fremdan lingvon estas malfacile lerni, la ellerno de la pluaj jam estas nekompareble pli facila. Kaj E-o, alproprigebla per dekona peno, kvazaŭ malfermas pordon por la aliaj. Mi mem, kiu en pluraj lingvoj ne bezonas interpretiston, sentis la nekredoblan avantaĝon de E-o.

— *Cu eble ĝuste E-o donis impulson transiri al la lingvistiko?*

— Certe. Ĝi vekis mian interesiĝon. Krome efikis ankaŭ la hazardo, ke turka gramatiko venis en mian manon. Komencinte ĝin studi, mi decidiĝis esti lingvisto, filologo. Mi enskribiĝis en la Budapeŝta universitato por la hungara, latina kaj greka lingvoj. En la kolegio Eötvös mi loĝis kune kun turko.

— *Vi rakontis, ke viaj kunstudentoj mokadis pri via E-a stelo kaj pri tiu „lingvaĉo”...*

— Jes, sed kiam ili aŭdis min interparoli kun turko Esperante, ĉesis ilia mokado. En 1914 mi vojaĝis al Francio kun stipendio kaj tie min trafis la mondmilito kaj la sorto de militkaptito.

— *Pri tio oni povas legi kelkloke en la vivromano de Aladár Kuncz: Fekete kolostor (Nigra Monakejo).*

— Jes, tie ni estis internigitaj ĝis 1917; tiam pro mia malsano oni min translasis al Svislando. En la universitato de Lausanne mi studis la francan, hispanan, italan. En 1919, hejmenveninte, post du fak-ekzamenoj mi ricevis mian profesor-diplomon pri hungara kaj franca lingvoj kaj literaturoj. Mi supozis, ke fine jen la ĝusta vojo: latinidaj lingvoj! Mi verkis lernolibron de la franca lingvo kaj libron pri „Franca fonetiko kaj morfologio”, sed mia sekva libro jam montris mian viv-kaj stud-direkton: „Francaj fremdvortoj en la hungara lingvo”. Kaj mi partoprenis en la granda laboro, organizita de Pintér: „Hungara Senceksplika Vortaro”, kun etimologiaj rimarkoj ĉe la registritaj vortoj.\* Tiu grandioza laboro be-

daŭrinde devis ĉesi, sed min jam kaptis ĝia beleco, do mi rekomencis — jam sola — la etimologian laboron. Tiam oni min invitis profesoro de la hungara lingvo en la universitato de Debrecen. Kaj dume mi spertis jam, ke por la romanistiko ĉe ni mankas favoraj ebloj pro la malfacilo atingi la koncernan literaturon. Tial, en mia 47-a jaro mi decidiĝis okupiĝi intense pri la historio de la hungara lingvo.

— *Cu vi permesas demandon pri via E-a agado? Laŭ mia scio, vi lernis E-on kun Nikolao Bánó kaj Andreo Cseh. Krome vi, junule, verkis multe en La Verda Standardo (red. de Marich). Post tiu bela komenco...*

— Kial mi forestis de la E-a vivo dum jardekoj? Nu, mi jam parolis pri mondmilito, militkaptiteco, pri temporaba orientiĝado sur diversaj lingvistikaj terenoj. Kaj mi devis dediĉi mian tutan forton al miaj sciencaj esploroj. Tamen, mi neniam perdis mian interesiĝon pri mia unua lingva amo, kun kora atento mi sekvis ĝian evoluon, kaj mi avide legis ĉiun esperantaĵon venintan en miajn manojn. Mi konsciis ankaŭ mian „pekon” iaman: kvankam mi neniam estis poeto, mi tradukadis el la hungara poezio. Neniam mi pensis, ke oni tion elfosos.

— *Jes, Kalocsay komencis konjekti, ke tiu studento Cezaro Bárczi, kiu en La Verda Standardo aperigis kvin bildojn el La Tragedio de l' Homo estas identa kun la profesoro Géza Bárczi. Mi memoras pri mia granda surprizo, kiam post mia letero al vi sendita eksonis via voĉo en mia telefono en pura, flua klara E-o. Kaj precipe min ravis tio, kiam mi sciigis, ke vi parolas E-e post 40 jaroj la unuan fojon!*

— Tiu via letero akompanis mian unuan E-Vortaron aperintan en 1958. Tiam mi faris plurajn rimarkojn, proponojn. Min iom maltrankviligis la „nova Esperanto” prezentita en via vortaro.

— *Tiam, kaj ankaŭ poste, ĉe aliaj renkontiĝoj, se temis pri neologismoj, vi diris: „Ne trouzu tiun eblecon”. Kiel vi nun rilatas al tiu problemoj?*

\*Anstataŭ la tiam planita verko, nur en 1959 aperis laŭ novaj principoj en sep grandaj volumoj *A Magyar Nyelv Értelmező Szótára* (Senceksplika Leksikono de la Hungara Lingvo) sub la ĉefredaktado de Géza Bárczi.



— En ĉiu lingvo okazas konseia vortkonstruado: novaj nocioj postulas novajn vortojn. Tiel estas ankaŭ en la hungara lingvo; tiun bezonon ĝi kontentigis diversmaniere. Ekzistis vortprovvoj sukcesaj, kaj formoj, kiujn la lingvo el si elĵetis. Ankaŭ E-o bezonas daŭre novajn vortojn laŭ la evoluo de tekniko, scienco, ideologio, kaj ĝi povas ilin fari, eĉ pli facile ol la naciaj lingvoj. Kaj kompreneble la literatura lingvo bezonas ankaŭ nuancigojn. Tamen, oni ne malfaciligu E-on, ĝi restu ĉiam la plej facila lingvo, ĉar ĝi kreigis ne per erudiciuloj, sed por la granda amaso. Kiuj ne povas kontentigi per la esprimmanieroj donitaj en la lingvo, tiuj mistaksas E-on kiel lingvon.

— Vi certe scias pri la granda diskuto koncerne la mal-vortojn. Oni diras, ke ili ne estas, aŭ estas kontraŭsence sent-elvokaj. Kio estas via opinio?

— En ĉiuj lingvoj ekzistas afiksoj maligaj, senigaj, senskrupule uzataj sen difekto de sent-elvekeco. Ekzemple mi sentas tre bela la verson: *La granda lun' kaj la malgrandaj steloj...* Kaj vidu la analogecon en: *feliĉa—malfeliĉa, heureux—malheureux, happy—unhappy, glücklich—unglücklich.* Kaj multaj-multaj ekzemploj estus listigeblaj. Nu, kompreneble, mi ne kontraŭas absolute la kreon de novaj vortoj, ĉar ja plurfoje ili portas novajn kolorojn, nuancojn en nian belan lingvon. Ni ĝoju pri tiu granda avantaĝo, ke E-o povas evolui simile al la naciaj lingvoj, pruvante per tio, ke ni povas ĝin rigardi egalrajta kun la naciaj lingvoj laŭ strukturo kaj esprimiveco.

*Mi aŭskultis multajn ekzemplojn kaj opiniojn pri ĉiu temo de la intereso vizito, sed ne eblas ĉion citi. Necesus aparta artikolo pri ĉiu temo tuŝita, pri la enhavriĉaj rimarkoj kiuj ilustris lian parolon. Mi devis adiaŭi.*

*Mi iras tra la aŭtunkolora ĝardeno, rerigardas al la maljuna (olda) domo, kaj pensas pri la okdekjara juna scienculo kiu en sia laborĉambro travivis jarcentojn de la hungara lingvo. Mi sentas min pli riĉa ol kiam mi alvenis, kaj nun ekkonscias, ke mi forgesis esprimi miajn bondezirojn kaj tiujn de la esperantistaro. Klinante la kapon, mi mute diras dankon por la vivoverko de Géza Bárczi.*

Alfonso PECHAN

MILÁN FÜST

# MALJUNECO

*Ho kie jam vi, okuloj miaj, vidantaj tiel benata unu vizaĝon?  
Kaj kie jam vi, mirindaj oreloj, pintiĝantaj kiel la azenaj pro ia  
dolĉa-amara rido?*

*Kie vi, dentoj sangoversaj, de kiuj fendigis ne nur la frago, sed  
ankaŭ la pli ol ĝi ruĝa, sukoŝvela lip?*

*Kaj kie vi, tiel terurege sonanta kantado de mia brusto?  
Kaj kie la tortur kaj beno, vane nur serĉataj sur miaj vojoj  
frenezumaj, kun kurba bastono en la mano?*

*Kuranheli freneze? Persekuti la kapreleton, la kapreolkruran  
kaj poste sterniĝi, flustri, eĉ ne al tiu, sed al la luno...*

*Pri iaj misteraĵoj, kiujn neniu povas kompreni plene kaj kies  
nomo ĉiama estas feliĉo agitata?*

*Kie vi estas, moviĝadoj kaj nigraj malbenoj? Eterna rapidado?  
Kie la buŝo avida kaj kie mia ridego?*

*Diosinjoro, kie mia rido, kaj ankaŭ la senobjekta ridego,  
Kiam — ho lontanoj sensangaj de tagiĝoj resonegantaj! — tiel*

*ofte*

*Mi sternis min antaŭ vi en la tenebroj.*

*Aŭskultu min; junularo! Vivis foje greko maljuna,  
Kiu levis la manojn kiel statuo, kaj, repostulante sian Junecon,  
Diris malbenon Eshilan al tiu, kiu faris, ke oni devas tiel mal-  
juniĝi.*

*Duonblinde li staris sur monto, mergiĝinte en nura radioado — la  
vento batadis al li la grizajn harojn*

*Kaj el la denspalpebrumaj okuloj falis larmoj al la majestaj  
piedoj del Diaĵ.*

*Kaj tamen lia voĉo tondiris, haltis de lia voĉ la muelilo, ekstre-  
megis la montetoj*

*Kaj eĉ la kvinjara virŝafo la kapon levis. — Tamen la Diaĵo  
Ne respondis, ne alrigardis tiam la oldulon.*

*Ploris la Diaĵo. Ĉar kvazaŭ tamburon oni batus en liajn orelojn,  
tamburon obtuzan,*

*Kaj tion respondus la montodefalego, kaj la montodefalegon  
respondus la maro,*

*tiel antaŭ li kreskis granda kaj sankta la pramizero del maljuno.  
Ĉar jen tiu staris jam antaŭ sia tombo ankoraŭ kverelante kun la  
vento*

*Kaj volante sonigi sian pravon ankoraŭ unufoje antaŭ ol  
ruiniĝe defali...*

*Kaj poste li iris for ja, nature — silente iĝis fine tiuregione.  
Sed ankaŭ en lia koro jam estis tiam silento, ni ne forgesu, kaj*

*ankaŭ pli granda atento...*  
*Kaj ĉirkaŭkape krepusk-lum obtuza.*

Trad.: K. Kalocsay



Estas malfacila tasko skizi grandan fabrikon tiel, ke la leganto ricevu kompleksan bildon pri ĝi. La temo estas alirebla el la vidpunkto de okmil homoj laborantaj tie, kies 35<sup>0</sup>,<sub>0</sub>-oj apartenas al la konstanta stabo kaj faras fidele kaj ame sian laboron, pretendantan grandan kompetentecon. Oni povas konigi la temon per priskribo de la fabrikaĵoj kaj paroligo de la homoj, kiuj tiujn kreas, — aŭ per mallonga historia resumo. Ni elektis ĉi lastan manieron.


En la tempo, kiam komenciĝis en Hungario la industriigo, kiam validiĝis la tiam akceptita industrio-leĝo, en 01. 05. 1881. Nia patrio tiel iĝis en Eŭropo la sesa de entrepreno konstruanta telegrafojn.

Tiutempe jam daŭris la esplorado fare de Graham Bell rilate la telefonaparaton (1872—75). La patentigo okazis 14. 02. 1876. Kunlaboranto de G. Bell estis la hungaro Tivadar Puskás, kiu en 1877 konstruis la unuan telefoncentralon, vekante grandan sensacion en la mondekspozicio Pariza en 1879.

En Hungario Francisko Puskás estis la pioniro, kiu inter multaj malfacilaĵoj ekfunkciigis telefoncentralon en 01. 05. 1881. Nia patrio tiel iĝis en Eŭropo la sesa lando, kie telefona reto ekfunkciis komence kun entute 25 abonantoj. Malgraŭ la malrapideco kaj komplikaĵoj de la komenca evoluo, post kvin jaroj la nombro de abonantoj estis jam 779.

Ni citas el la hungara granda leksikono *Pallas* (eldono el 1897); „En nia patrio okupiĝis per fabrikado de telefonaparatoj la *Unuiĝinta Elektra Fabriko (Egyesült Villamosági Gyár)* antaŭe firmo *Eggert B. kaj Kompanio*, krome la firmo *Deckert Homolka*...”

En la 1886-jara unua hungara industria ekspozicio jam prezentis siajn fabrikaĵojn la firmo „*Eggert B.*” akirante per ili grandan sukceson.



Inter aliaj firmoj ankaŭ tiu entrepreno formiĝis akcia societo en 1896, sed *EGYESÜLT IZZÓLÁMPA ÉS VIL-LAMOSSÁGI RT.* (Unuiĝinta Ampola Kaj Elektra A.S.) baldaŭ transprenis la telefon-fabrikantan uzilon, kiu en la sekvaj jaroj parto de la A.S. daŭrigis sian laboron.

Komence de la 1910-aj jaroj oni fabrikas jam permanente kluĉantajn centralojn por eksporto, ĉefe al Rumanio, Serbio kaj Turkio.

Inter la telefoncentraloj, konstruitaj post la unua mondmilito, en Budapeŝto jam ekzistas manklučaj centraloj kun 20 000 linioj. En 1928 la telekomunikada parto eliĝis el la lastnomita A.S. kaj formiĝis je „*STANDARD VIL-LAMOSSÁGI R.T.*” (Elektra Akcia Societo *STANDARD*).

Post la dua mondmilito al fabriko estis alŝtatigita, kaj dudek jarojn post la ŝtatigo la fabriko alprenis la nomon:

BELOIANNISZ HÍRADÁSTECHNIKAI GYÁR (BHG).

*Telekomunikada Fabriko Beloiannis.*

Rememorante, ke la firmo B. Eggert komence havis malpli ol 100 laboristojn, la evoluon ilustras jenaj etat-ciferoj: en 1936 — 1991, en 1953 jam 5668, — kaj hodiaŭ pli ol 8000 laboruloj apartenas al la granda laborfamilio de BHG.

Post la alŝtatigo formiĝis la memstara evoluiga fabrik-sekcio, kiu inter la ŝanĝiĝintaj cirkonstancoj klopodis kun freŝaj fortoj sur novaj vojoj esti ĉiam laŭtempa kun la konstante kreskanta evoluo. Ĉi tiun klopodon kronis plena sukceso.

Dum la postmilitaj tempoj la fabriko produktis radioprogram-sendilojn, mikroondajn kaj aliajn tele-teknikajn aparatojn, telefoncentralojn kaj telefonojn. Por tiel multspeca produktado la ĝistiamaj kadroj de la fabriko jam ne sufiĉis kaj tial komence de la 60-aj jaroj okazis moderniga trakonstruado de la uzino je kosto de pluraj centmilionoj da forintoj kaj kun soveta helpo. Rezulto estis pliobliĝo de la produkta kapacito.


En tiu periodo okazis ankaŭ la specialigo de la fabrikado instigata ankaŭ de la en- kaj eksterlanda interesiĝo. Ja eĉ la debito de telefoncentraloj plenigis jam la produktokapablon de la fabriko. Sekve de la specialigo, nun jam pluraj Hungariaj granduzinoj okupiĝas per fabrikado de profesiaj telekomunikadaj instalaĵoj.

La ĉefinstituto de BHG en Budapeŝto (XI. Fehérvári út) estas la plej granda inter tiuj uzinoj. Ĝiaj filioj en provincaj urbetoj *Tatabánya* kaj *Kunhegyes* donas laboreblecon al la gejunularo de tiu ĉirkaŭaĵo. La konstante evoluanta fabriko konstruas nuntempe sole telefoncentralojn, — kaj ĝiaj laboruloj, konsciante sian respondecon, faras sian laboron, gravan ankaŭ por la popola ekonomio. Le pretproduktaĵoj kaj ekipaĵoj — faritaj de ili — anoncas la bonan famon de la fabriko kaj de ĝiaj varoj en multaj partoj de la mondo. Tion karakterizas, ke krom la hejmlanda utiligo proksimume 80% de la produktaĵoj estas akceptataj en la internacia merkato. Inter la plej grandaj partneroj de BHG ni mencias, Britlandon, Ĉeĥoslovakion, Germ. Demokratian Respublikon, Pollandon, Sirion kaj Sovetunion.

Ĉiloke ni mencias, ke la entrepreno priservas la bezonojn de la Hungaria Poŝto kun plej granda zorgo, plenumante ties mendojn per konscienca atento. La tutmonda rekono de la Hungaria Poŝto, kiu ja estas la plej malnova partnero de la fabriko, ankaŭ kunhelpis plivastigi la renomon de BHG.

85% de la produktaĵoj (konsidere de la tempo de pretigo) estas kreaĵo ne pli ol kvinjara.

Je fino de la 1950-aj jaroj formiĝis la moderna *krosbar-tekniko*. 90%-e estas konstruataj nuntempe centraloj laŭ krosbar-sistemo. La adapto de la elek-



**CA-22**

trona-tekniko ankaŭ plene estas rezulto de la hungara evoluigo.

Pro la dinamika kresko, la fabriko duobligis sian produktaron dum la lastaj dek jaroj. Depost 1968 la meza kresko de la produktado estas jare 16%-a. Por plua akcelado de la evoluo — en intereso de teknika kunlaboro — BHG ligis kontrakton kun sveda firmo *LM Ericsson*.

Krom la industriaj taskoj la entrepreno multe prizorgas interesojn de siaj laborantoj. En la refreŝigejoj de la entrepreno trovas ripozeblajn la laboruloj kaj preskaŭ ĉiuj iliaj familianoj. En *Balatonszabadi*, *Balatonlelle* kaj en la apudbalatona urbo *Keszthely*, en kiu lasta la plej moderna ripozdomo — nun por 150 personoj — ebligas la someran ripozadon. Ĝia pliampleksigo jam planata.

La Telekomunikada Fabriko Beloiannis estas la plej granda fabriko de telefoncentraloj en Mezeŭropo, kaj inde al sia bona paseo kaj aktiva prezenco, ĝi estos plu grava faktoro de la telefonteknika evoluo.

# PER PLUMO

## *Notoj de taglibro*

23. majo 1960. — Ni eldiskutis la radio-dissendon de Hamlet.

Tiu ĉi kara *Hamlet*. Elludi lin sur la scenejo estas la plej feliĉa vespero de mia vivo. Sed tiu ĉi dramo ne povas esti elludita, nur ludata, eterne, kontinue!

Kial ĉi tiu reĝido estas „nekaptebla”? Ĉar li estas William mem. Othello estas grandioza verko de profesia aŭtoro. Sed en Hamlet enestas ĉio, kio aperis mense dum ĝia verkado, kune kun siaj kontraŭdiroj, senelekte. Shakespeare prenis la prete ricevitajn temojn de Hamlet kaj en ĝin enskribis ĉion, kio dume ŝetigis sub lian plumon.

15. marto 1961. La reĝisoro V. timas, ke mi ludos por esti „interesa”; mi mem timas, ke li reĝisoros Hamleton en ion Schiller-an. Ni devas ludi la simplan historion, la maltrankvilon de la dramo.

La grandeco de Hamlet troviĝas en tiu lia kapablo kaj devigiteco, ke ĉiun situacion li vastigas en problemon de vivo kaj morto. La esenco de la dramo titolita Hamlet estas, ke en ĝi vere estas Hamlet, la rolo, la homo. *Kiu lin komprenas kaj kiel, tio estas la ĉefa demando de la dramo.* Tamen, tio neniel signifas nuran psikologian figuradon de unu homo. Mi ne volas serĉi novan neŭropatologian aŭ eble filozofian respondon je la „sekreto” de Hamlet. Mi volas nenian interesajn aŭ saĝumadon...

31. majo 1961. — La dramo de atendado. Ĉiu penso kaj ago de Hamlet estas: pasigo de tempo ĝis venos la okazo. Li atendas, kelkfoje ekatentas: ĉu estas jam eble mortigi. Kaj, dum la tempo pasas, li babiladas. Jen ĉi tie la dramo: kontraŭstarigi la tempon kun ties propra enhavo...

30. oktobro 1961. — La unua lega provo el Hamlet. De nun dum pli ol du monatoj mi povas pasigi mian preskaŭ tutan tempon en la societo de ĉi tiu dramo, de nun ĝi fariĝis parto de mia vivo; iam ajn mi povas ĝin preni, lerni, kun ĝi ludadi, translasi min al ĝiaj surprizoj. Ĉar eble ĉi tio estas mia plej granda ĝojo: la nova kaj denova surprizoj. Vi pensas, ke vi scias jam ĉion — kaj tiam venas la tombeja sceno! Kiu do atendus ĉi tiun brutalan mokon, per kiu li atakas kontraŭ Laertes, ĝuste ĉe la tombo de Ofelia; kiu do atendus ĉi tiujn vortojn pri la propra danĝereco!?!... Ni ekvidis el Hamlet tavolon pli profundan, kie klari-

---

\*Partoj el la libro de nia aktoro kun Eŭropa rango kaj famo. (La dramon Hamlet ankaŭ de tiam havas en sia programo la Teatro Madách en Budapeŝto.)



*Miklós Gábor kiel Hamlet*

ĝas, ke li estas Hamlet eĉ pli multe: ni neniam kredus ja antaŭe, ke li estas Hamlet tiamezure! Paroli tra nuraj surprizoj pri tiu sama afero: ankaŭ ĉi tio estas miraklo de Shakespeare.

La ĝojo de la unua provo similas tion, kiel se oni iras al rendezuo tiamaniere, ke dezire kaj time oni sin aljetas al la nekonata persono: „Faru al mi, kion vi volas! — Infanecan ĝojon mi sentas. Eĉ legi mi emas nenion krom „Sinjorido Tomaso”.

9. novembro 1961. — Studoj, eseoj pri Hamlet: multaj saĝaj detal-veraĵoj pri la demando: kial efikas Hamlet ankaŭ hodiaŭ?

Mi sentas mirinda naivaĵo, ke Hamleton multaj rigardas malsane melankolia aŭ neŭroza simple pro tio, ke li ne trovas sian lokon en la mondo, kiu lin atendas prete: mondo de tiraneco, murdado, perfidoj, hipokrito, stulto, bagatelemaj intrigoj kaj virina malfidelo. Tiu naivaĵo, ke Shakespeare „juĝas” super Hamlet, povas deveni nur de tia generacio, kiu kontente akceptas kiel normon la konvencian societatan moralon; akceptas ĝin de homoj vidantaj neŭrozon kaj malsanon en la grandeco kaj tragika vivrigardo...

La jarcentojn daŭranta kaj ĉiam renoviĝanta efiko de Hamlet estas neklarigebla, se ni ne rigardas lin tragika heroo, reprezentanto kaj plekdanto de ni ĉiuj...

Kaj ree la grandioza filmo de *Olivier*. Ankoraŭ neniam ĝi kuntrenis min tiel potence. Unuavice: la senlima tenereco de Hamlet, lia knaba bonkoreco, konstante ronĝanta doloro, en kiu lia tuta amara, morda saĝo solviĝas adoleske senkulpa kaj infaneca...

La filmo ne prenis for mian kuraĝon. Sed Olivier solvis Hamleton, kaj min en la aktorarto interesas ne la ellaboro, sed ĝuste la solvo! Ĉu mi trovu sufiĉa adapti ĝin sur la scenejon kaj travivi, kion esence li jam elfaris? Mi ne timas transpreni de Olivier ĉion, kion mi bezonas, sen kio mi ne povas produkti pli bonan. Se vere mi volas atingi ion, nur tiavoje mi povas tion fari.

16. novembro 1961. — Nun, unuafoje, kiel mi vin envias! — diris al mi aktoro-amiko. — Kion nun vi faras, tio estas la plej bona, kion homo povas ricevi.

Kiomege mi tion scias!

La psikologia kaj socia realismo de Olivier ĉiam efikas konsternite. Li ĉiam estas ankaŭ akrobato. Ĉiutaga situacio kaj mortosalto: jen kio estas la arto.

5. decembro 1961. — Gérard Philipe, ĉi tiu arkianĝelo — kies grandeco tial ne estis ĉe ni ĝenerale sciata, ĉar li estis tiom rava kaj neniom gravmienne pozema — estas modelo pri la vera arta alvokiĝo. Li estis kapabla radii ĉirkaŭ sin eĉ en Zola la brilon de ĉarmo, amo kaj juneco... Ni povas nin trovi bonaj en iu rolo nur tiam, se ni havas en ni la ripozigan, karesan senton de la renkontiĝo kun ni mem, kaj eĉ kun nia brila duono. La vera rolokreo ĉiam kunestas kun la sento de libereco...

19. decembro 1961. — Mi ankoraŭ ne scias la tekston prefekte, sed mi jam havas tiajn sentojn de senpacienco, ke oni devus ludi, ne provi...

23. decembro 1961. — Malfacile estas tiaokaze diri pri iu, ke li estas normala. Mi vivas, ekzistadas tute fremde al mia ĉirkaŭaĵo. Plej volonte mi fuĝus de la kristnasko. La preparadoj, la apenaŭ elportebla atendado de mia filineto, la vitraj ornamaĵoj sur la tablo, la ĉie ajn kaŝitaj pakaĵoj: ĉio ĉi igas min melankolia, ĉar ĉio ĉi nur reliefigas mian solecon. Por mi la kristnasko estas la festo de la surpranita soleco kaj malamo. Donu, Sinjoro, ke viaj festoj forpasu kaj mi povu reveni al Hamlet.

10. januaro 1962. — Bona provo, tiel ke ni ellasas la morgaŭan ĉefprovon. Mia patrino hodiaŭ min vidis unuafoje en la rolo. Kun larmaj okuloj ŝi sidis en mia vestejo.

— Kiam oni vin elportis sur la ŝildo, mi ne povis reteni miajn larmojn — ŝi diris. — Tamen vi estas ja mia filo.

— Tiam la alia estas tiel fremda — diras Ĝ. — Li estas tiel malproksime, tiel supre ialoke!

Kaj kiel bone estus resti tie, ialoke supre! Mi ĝojas, ke morgaŭ mi ne devos ree lin ludi, tamen... Ne, tiu Hamlet, tiu jam ekzistas, eble neniam plu mi devos lin ludi, tio estus la plej bona, nur anoncu ĉiuj radio-dissendoj de la mondo, ke la plej bona Hamlet, persone Hamlet mem, hodiaŭ estis videbla en la Teatro Madách; ankaŭ ĉi tio sufiĉas. Sed necesus tamen io alia! Legi, vivi, aŭdi sur tiu ŝtupo, tie supre! Mi timas! Kiel mi povus scii, kiel do mi ludos en la publikaj ĉefprovaj, en la unua prezentado? Mi timas la publikon!...

12. januaro 1962. — La unua publika ĉefprovo

## Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Vilmos Benczik

Ĉinumere ni dediĉos la enigmon al la verko de Géza GÁRDONYI: Sklavoj de Dio.

1. Kel nomiĝis pli frue tiu insulo de Danubo, kiu nun portas la nomon de Sankta Margareta?

2. Kio estas *klaŭzuro*? (Oni sendu la difinon, troveblan en la libro.)

3. En la romano troviĝas aludo pri malgranda milito kun la serboj. „En la provinco de princo Béla de Mácsa detruadis la serboj” — legiĝas. En kiu jaro tiu milito okazis?

Kiel kutime, oni respondu minimume du el la tri demandoj. Limtempo: 1-a de aprilo 1974.

Pro la solvo de la enigmo en la n-ro 3/1973 gajnis libropremion: Jenő Egey (Tirgu Mures, Rumanujo) kaj Károly Ságvári (Szárliget, Hungario). La librojn ni sendis perpoŝte.

Ĝustan solvon alsendis ankoraŭ: Bárta František (Ĉeĥoslovakio), Jürgen Hamman kaj Werner Gafke (GDR), Pál Ostein, Vilmos Horváth, Éva Zombay, Lászlóné Bognár, Stefania Hayden-Nagy, Csaba Lendvay, Helena Osgyán, Balázs Szemők (Hungario), Jerzy Banacki (Pollando), Johannes Palu (Sovetio.)

## Korespondi deziras

DDR: Franz Peter Kurtz, 27 Schwerin, Obotritenring 195. (estrarano de la urba klubo)

POLLANDO: Danuta Mazur, PTR Podzamcze Chęciny, ul. Tyszkiewiczza 15. (Sporto, filmo, geografiaj libroj, bk.) — Mieczysław Porowski, 45-774 Opole, ul. Dambonia 133/15 (26-j. ekonomisto) — Zbigniew Frczkowski, 72-600 Swinoujście 1, ul. Poznańska 11/5, (18-j.) — Zahorski Włodzimierz, 42-500 Bedzin, ul. Kosciuszki 16. (interŝ. pm, interesiĝas pri konstruado de unufamiliaj domoj)

SOVETUNIO: Heino Metsamärt, Kunderi 7, 202900 Viljandi, Estonio (33-j., kol. insignojn)

HUNGARIO: Heak Ho Sreang, 1149 Budapest, XIV., Nagy Lajos király út. 202.

antaŭ plenplena spektejo. Julinjo, mia filineto, kun Avinjo, sidis meze de la unua vico; en la minutoj de mia agonio mi vidas, ke ŝi ploras, kaj ke Avinjo ŝin konsoladas. Kelkaj el miaj kolegoj estas kortuŝe afablaj, surprizas min per donacoj, sincere timfebras pri mia sukceso. Mi havas sukceson, kaj, inter la aplaŭdoj, vidalvide al la publiko, mi ekploras. Kiam do mi sentis tian feliĉon? Eble ĉe mia unua sukceso, en 1945, en la premiero de la *Coc-teau*-dramo: tiam mi sentis ĉi tiun senpekan, nainvan kaj fideman sindonon.

Poste pasas la tago super mi, estanta en lito, dormanta, leganta, senkomprena. Kelkfoje neatendite min surfrapas unuopaj malfruigiĝintaj ondoj de sentimento.

Kelkfoje mi miras: ĉu mi mem estis tie? Mi estas plie trista kaj en iu ajn momento mi estas preta ekplori.

Tr. L. KÖKÉNY

# REVUO DE REVUOJ

THE BRITISH ESPERANTIST ĉiam enhavas interesajojn. La rubriko „Aliflanke...” de D.J.F. QUIRKE kirlis tiel grandajn ondojn, ke ili refrapiĝis en la gazeton mem, inundante ties du paĝojn. Mi volas paroli nur pri la afero de disdialektiĝo de E-o okaze de la ekskluziva uzado de la lingvo. Mia opinio, tia dialektiĝo estus nepra pro diversaj kaŭzoj. Mi mencias nur unu, la restaĵojn el la lingvoj, kiujn E-o anstataŭus. Se E-o estus ĉies dua lingvo, tiam oni ĝin respektus tiel same, kiel nun ĉiu respektas ellernitan lingvon negepatran. La gepatran lingvon oni tro amas por ĝin respekti. Tial malgraŭ komuna literatura lingvo ĉie konserviĝis la dialektoj kaj eĉ formiĝis kaj formiĝas slangoj kaj ĵargonoj, ekzemple en la grandurboj.

En siaj lingvaj notoj AVO surplingligas el H.V. duoblan negacion „la regnestroj donos ja neniam nenion”. Miascie la malpermeso de la duobla negacio ne validas ĉe duopaj tabelvortoj, vd. la zamenhofan: „Tiam... utilon ni alportus al neniuj nenian.” Estas notinde, ke en lingvoj, kie oni uzas duoblan negacion, tiaokaze oni neas trioble: „utilon ni ne alportus al neniuj nenian.”

ESPERANTISTO SLOVAKA, kvankam ĝi ankoraŭ ne elkreskis el sia stencila aĝo, fariĝas pli kaj pli ampleksa kaj multflanka, tiom ke ĝi publikigas eĉ receptojn de diversaj salatoj, krome porinfanan paĝon, poeziajn tradukojn kaj didaktikan artikolon pri krucenigmoj. Mi nur ne komprenas, kial publikigi specimenojn el la P.V. En nacia gazeto estas ja multe pli facile kaj spacoŝpare klarigi E-an vorton nacilingve ol per longa senc-ekspliko.

MEDICINISTAJ INFORMOJ brave eltenas: aperis la kvina numero de la dua jarkolekto. El la

artikoloj por mi tro fakaj mi ellevas la interesan pritrakton de la bonfaraj valoroj de la verda teo. Teknika novaĵo estas la aŭdovida gazeto MEDISCOPE por la francaj kuracistoj.

LA SOCIALISTO, organo de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista informas en letero el Londono pri la nova partia programo de la Brita Laborista Partio (ĉu ŝtatigi aŭ neŝtatigi la industrion); pri la revivigo de la Internacia Esperanto-Instituto, kiu pro la aĝo kaj malsano de Andreo Cseh kelkatempe ne funkciis; pri la naskiĝo de „Aŭstria Stalgiganto”. La gazeto konigas kelkajn ludojn tre konvenajn por E-aj grupoj kaj plimalpli parencajn al la Bar Kofha-ludo konigita en nia revuo.

SENNACIULO en sia aŭg.—septembra numero raportas pri la SAT-kongreso en Norda Ameriko kaj publikigas ties gvid-rezolucion, kiun, cetere, mi trovas ne tre multedira. La revuo opiniis necesa publikigi artikolon pri Karlo Marks fare de A. MILDWURF. La artikolanto zorge gardas sin diri pri la marksismo iom pli, ol kiom estas trovebla en ĉiu malgranda enciklopedio. Kaj kvankam li devas fine koncedi, ke „neniuj pensulo en la deknaŭa jarcento havis pli potencon influon je la homaj aferoj”, li restas ŝulda pri la analizo de ĉi tiu influo. Tute strange, pli ol la triono de lia artikolo okupiĝas pri la rilato de Marks al la judismo. Ĉi tiun malŝparitan spacon li vere povus uzi pli utile.

LA SUDA STELO en sia tria numero publikigas la artikolon de MARINKO ĜIVOJE pri la 65 jaroj de E-movado en Beograd kaj Serbio. Tiaj artikoloj estas tre bonvenaj: en ĉiu lando oni devus esplori kaj verki la tiulandan historion de la E-a movado, ĉar nur tiamaniere oni povos iam verki la

tuthomaran historion de E-o. Tamen mi devas fari la riproĉon, ke la artikolo de M. Ĝ. estas tro konciza, tro skiza, en ĝi svarmas listigo de nomoj senvizagaĵaj, ĉar nekaraktarizitaj laŭ personeco kaj agado. Tio havas la malavantaĝon, ke tiajn nomlistojn la leganto simple transsaltas.

En STARTO, organo de la Ĉeĥa E-Asocio, inter diversaj interesajoj troviĝas okulkapte la artikolo de KAROLO PIĈ „Por la Zamenhofa Esperanto”. Ĝi estas batalskribajo kaj, ĉar la aŭtoro estas poeto, nemirinde, ke ĝi estas plena de impulso kaj impeto. En 12 punktoj ĝi resumas tiujn tendencojn, kiuj laŭ li endanĝerigas la lingvon. Mi ne havas sufiĉan spacon pritrakti ĉiujn 12 punktojn, nur pri tri mi volas fari miajn rimarkojn. 1. „E-o komencas perdi sian unikan popolan karakteron kaj kun ĝi, bedaŭrinde, ankaŭ sian unuan kaj ĉefan ekzistatorajton kaj sian plej grandan forton”. Sincerdire, mi ne komprenas la animstaton, kiu diktis ĉi tiun punkton. Estas vere, ke E-o multe riĉiĝis per teknikaj terminoj kaj poeziaj vortoj, sed tio neniel malhelpas uzi la plej simplan lingvaĵon. Analoge: la matematika scienco tiom komplikiĝis kaj disbranĉiĝis, ke kultivanto de iu ĝia branĉo jam estas nur skize orientita pri ĝia branĉo alia. Tio tamen tute ne malfaciligis la kvar aritmetikajn operaciojn: adicon, subtrahon, multiplikon kaj dividon. Neniel do oni devas timi, ke geedziĝoj inter diversnaciaj geesperantistoj de nun ne okazos, ĉar la amleteroj en E-o estos tro komplikitaj por esti komprenataj. En la 4-a punkto Piĉ kondamnas la „grekigon” de E-o, la kreon de aparta „greka ĵargono”. Ĉi tio certe aludas al PIV, en kiu estas registritaj la grekdevenaj partoj de teknikaj terminoj, ekzemple geo- (tero), kiu troviĝas en 12

terminoj (geodezio, geografio, geologio ktp.). Sed ĉu tio grekigos la komunan lingvon? Ĉu iu skribos ekzemple: „Li furioze piedbatis la geon”? Ceterc, estus memmortigo de E-o, se ĝi volus devigi la scienculojn, ke ili rezignu pri siaj familiaraj teknikaj esprimoj, kaj uzu nur „purismajn” E-ajn vortojn, ekzemple „skribkarakter-analizo” anstataŭ „grafologio”. Estas certe, ke E-o pro sia granda fleksebleco estas perfekte taŭga por kreo de teknikaj terminoj. Sed uzi ekskluzive tiajn oni povos nur tiam, kiam E-o estos ĉies dua lingvo kaj ame familiara al ĉiu, ankaŭ al la scienculoj. Fine, en la 10-a punkto Piĉ protestas kontraŭ tio, ke oni rigardu E-on ia eksperimento kaj ludilo. Nu, mi ne komprenas lian proteston, ĉar uzi lingvon signifas eksperimenti per ĝi: se oni taskas al si fari tradukon malfacilan, tiam oni faras eksperimenton de traduko. Kaj ĉiu lingvo de la mondo estas ankaŭ ludilo, ne nur por humoristoj, sed ankaŭ por poetoj.

## HUMURO

Fileto de elektromuntisto ekploras vee. La patro lin demandas, kio lin trafis.

— Ve, paĉjo, — li respondas — mi kaptis vespon kaj ĝi ne estis izolita.

\*\*\*

— Ĉu vi povus diri ion karakterizan pri tiu viro, kiu vin atakis hieraŭ en la parko?

— Inundis el li la alkohol-odoro.

— Tamen, ion pli precizan?

— Ĝi estis pruno-brando.

\*\*\*

La absolute severa ĉefo respondigas en la oficejo sian subulon.

— Kial vi malfruis hodiaŭ?

— Bonvolu ne koleri. Kiam vi venis el mia loĝejo, subite ekturigiĝis al mi la kapo kaj mi ruliĝis malsupren sur la ŝtuparo.

— Ĉu vi malsuprenruliĝis? Sed tiam vi povus ja alveni eĉ pli frue!

\*\*\*

Okazas la unua granda kverelo inter la junaj geedzoj. La edzino komencas paki.

— Mi reiros al mia patrino.

— Iru, iru do!

— Sed mi revenos kune kun ŝi!

Kuracisto veturigas sian aŭton malregule. Policano lin haltigas, petas lin pri lia veturlegitimilo. Ĉio ĉi daŭras longe, la kuracisto senpaciencaĝas:

— Se vi min ne haltigus, mi jam delonge estus en la hospitalo.

— Nu, vidu, mi vin petas. Vi povas do esti al mi eĉ danka.

\*\*\*

Direktoro diras al sekciestro:

— Sinjoro Kerek, mi avertas vin: se vi ne volas skandalon, ne flankumu ĉirkaŭ fraŭlino Lakatos.

— Ho, sinjoro direktoro, mi certigas vin, ke mia edzino tute ne estas jaluzema.

— Sed mi jes!!!

\*\*\*

La edzo kuras hejmen ekscitite:

— Morgaŭ vi forlasos tiun oficejon. Jus mi sciiĝis, ke la ĉefo tie ekflirtis amrilate kun ĉiu virino, krom, kompreneble, unu.

— Jes, mi scias. Krom tiu bruna knabino en la librotenistejo.

Dum Via vojaĝo en Hungario certigas Vian komforton

**EN STACIDOMOJ**  
restoracio, bufedo nutraj-  
pavilono

**EN TRAJNOJ**  
litvagono, restoraci-  
vagono, bufedvagono

**EN ŜIPOJ**  
restoracio, bufedo

**EN LONGDISTANCAJ AŬTOBUSOJ**  
bufedo



**UTASELLATÓ**

Favorpreze certigas la manĝigadon de turistaj grupoj la Pasaĝerproviza Entrepreno. Informojn donas kaj laŭdezire skribitan informon sendas la Pasagerproviza Entrepreno, Budapest, V., Veres Pálné u. 24. Telefon: 189-900/160

# PRI LA VIRINA EGALRAJTECO PER OKULOJ DE KURACISTO

Ĉiu revolucio kreas sian marŝkanton: tiel venis en la mondon la dramo „Nora” de Ibsen, en kiu dramo la frapfermiĝo de la pordo de „Puphejmo” estis la unua fusilpafo de revolucio longtempe maturiĝanta kaj ĝis nun ankoraŭ nefinita. Jes, ĉar nun, post preskaŭ cent jaroj, la egalrajteco de la jupoporta homo ne estas ankoraŭ konsekvence difinita eĉ en la praktiko de nia socia ordo. Pli kaj pli urĝaj estas la esploroj pri la maniero kaj mezuro de la virina laborplenumo, ĉar nun, eĉ la reformiĝanta interrilato de la seksoj, la problemoj devenantaj el la troŝarĝado de la virinoj prezentigas kun aparta graveco en la praktiko de la psikologo kaj psikiatro. Ni prezentos kelkajn kazojn, kiuj demonstras al vi detalojn el la virina problemaro de nia socio.

*Troŝarĝo-responseco.* S-ino J. N., 38-jara, laboras en kemia fabriko, purigadas la mezurilojn en loko eksplodo-danĝera; ŝia laboro postulas koncentritan atenton kaj laŭtaktecon. Sub stres-efiko ŝi sentas sin pli kaj pli robot-maŝino, kiu grado post grado postrestas siajn tagajn farendaĵojn. En la kirligado de la hejmaj taskoj kaj laboratoriaj devoj ŝi komence sentis malamon, poste grandan angoron, fariĝis ekscitiĝema, laciĝema, senapetita. Ŝiajn plendojn ŝiaj laborkunulinoj akceptis kun ŝercadoj pri ŝia edzo, ankaŭ ŝia ĉefo traktis sin senkomprene. Ĉe la kuracista ekzameno ŝi rakontas, ke de kiam ŝia edzo laboras en provinca filio, kaj nur malofte vizitas hejme, ŝi sola prizorgas iliajn tri infanojn. Ŝi laboras jam de 20 jaroj kaj ne volas ĉesigi la fabrikan laboron, ĉar la „hejmsi-

dantinoj” regresas intelekte. La solvo, laŭ nia opinio, estus la dividado de ŝiaj zorgoj kun la edzo kaj la laborkunuloj: tio malpliigus la streĉon de la mikroklimato, la timon, la angoron. Sed, bedaŭrinde, en malmultaj laborlokoj oni povas sperti respondecon unu pri la alia kaj helpopretecon, eĉ interne de familio ne ĉiam.

*Vira laboro? Virina laboro?* Engels demonstris la interdependon de la seksoj en la procezo de la hom-formiĝo. Dum la multmiljara kunagado la konscio de ambaŭ seksoj evoluis sammaniere, estiĝis en ili kapablo kompensi sin reciproke en la laboro. Sammaniere, sed ne samkoste. Ekzistas ankoraŭ la konservativa koncepto de la sente evoluinta sed intelekte subordigita virino, kaj ĝi influas ankaŭ la memtakson de la laborkunulinoj. Dr-ino K. H., eminente instruita, gvido-taŭga kuracistino trifoje malsukcesis ĉe konkurso pri ĉefkuracista posteno. Unuafoje, kiel kutime, oni nomumis viron, pli junan ol ŝi; duafoje ŝi malvenkis pro manko de scienca grado. (Por gardi la „familian harmonion” ŝi atendis, ke ŝia edzo akiru la unua la gradon de sciencul-kandidato.) Fine, ŝi estis rifuzita pro virina rivalo, kies avantaĝo eĉ la konkurso estis ŝia malbeleco.

*Divorco pro la „kulpo” de la edzino.* La geedzoj F. X. interkoniĝis en fabriko, junaĝe geedziĝis, ambaŭ lernis en laborulara gimnazio, la infanojn la geavoj edukis. La virino faris maturekzamenon, sed la edzo ĉesigis siajn studojn, sian edzinon li nomis ambiciulino. Kiam la edzinon oni akceptis studi en la universitato, la

situacio fariĝis kriza. La edzo pli kaj pli drinkis kaj kverelis, kaj, laŭ lia peto, oni eldiris la eksedziĝon. La edzino fariĝis profesorino, nun jam povis pli okupiĝi pri sia familio, kaj ankaŭ kun la edzo ŝi volonte religus sin, se ĉi tiu ĉesigus la drinkadon. Sed la edzo jam elektis por si virinon „malpli ambician”. La edzino, akuzante sin mem, akiris gravan depriman neŭrozon kaj longtempe oni ŝin kuracis en nervo-sanatorio.


*La teksistino kaj la kolonelo.* Ĉi tio estas la inversaĵo de la antaŭa historio. Interkoniĝo en fabriko. Poste la edzo soldatiĝis, plenumis oficir-lernejon, multe forestis de la siaj. La edzinon tute katenis la hejmlaboro kaj ŝi baldaŭ sentis, ke ŝi ne havas komunan temon kun la edzo. Kiam la edzo deklaris, ke li enamiĝis al sia kunlaborantino, la edzino konsentis la divorcon post multtaga plorado. Sed la eksedzo-patro pasigis pli da tempo kun siaj adorataj infanoj ol kun sia nova edzino, kaj ĉi tiu malpli kaj malpli toleris tion. La krizo finiĝis per tio, ke la eksedzo-patro, en la kvara jaro de sia dua edzeco, mortpafis sin.

Pri la ĉi-supraj kazoj ni tute ne asertas, ke tia estas la vivo-vojo de la plimulto de la emancipitaj virinoj. Sed tiaj ruinigitaj vivoj, observataj de la nervkuracisto, estas patologiaj signoj, kiuj montras hiatojn de socialaj kontaktoj. Ĉi tiuj linioj estu destinitaj por vekti en la leganto la senton de socia respondeco koncerne la virinan egalrajtecon.

Laŭ d-ro Pál AVAR:  
Mária Rózsa SZABÓ



# Esperanta Prozo



Pluraj vicoj de nia enigmo koncernas la titole menciitan temon, ĉeftemon de nia nuna numero. Ensendi sufiĉas la solvon de vicoj formantaj la kadron de la figuro H.: 1., 8., 81. kaj 82.; V.: 1., 13., 44. kaj 54.

**HORIZONTALAJ VICOJ:** 1. *Nederlanda E-verkisto, aŭtoro de la romanoj: Idoj de Orfeo, La Vila Mano, Inferio (Hendrik Jan).* 8. *Sveda E-verkisto, gajnis la premion de romankonkurso de Literatura Mondo per sia verko: Homoj sur la Tero (Stellan).* 14. EET. 16. Starigis ekz. konstruon sur io. 18. Laŭta subita sono de voĉo. 20. Reen: tabelvorto. 21. Urbo en Francio fama i.a. pro silkindustrio (ne esp-igita formo). 23. Aspektas. 25. La plej fama hungara E-prozisto. 26. Romano de EMBA pri la vivo de esperantistoj. 28. Superanta la ĝustan mezuron. 29. Ĉeĥa E-verkisto, aŭtoro de Alaska Stafeto (František). 30. Tero, polvo, miksitaj kun akvo sur strato, vojo (Radiko). 31. Prepozicio. 33. ORM. 34. Malgrandulo. 35. Ombreforma aparato, uzata malrapidigi la malsupreniĝon de falanta korpo. 38. Samaj vokaloj. 39. Mister... aĉetas mil okulojn, titolo de la romano de Jean Forge. 41. Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj, fondita en la jaro 1933. 42. Akcepti kiel proklamblan. 44. Piedo de verso, konsistanta el du longaj silaboj (R). 46. Titolo de la revuo de la samnoma spirita movado en Japanio. 48. Ano de gento devena el Hindio. 51. Plurjara legomo kun folioj similaj al la poreaj kaj kun akragusta bulbo. 53. Meti en sekretan lokon (R); 55. RD. 57. La diinon de la milito kaj de la inteligenteco ĉe la Romanoj. 59. Titolo de la krim-romano de Henri Valliene. 61. Prepozicio. 64. Oksigeno kaj kalcio. 65. La aero ankaŭ tio estas (R). 66. Usona verkisto (Norman Kingsley 1923—). 67. Maldolĉa por la gusto (R). 70. Turka poeto, ricevinto de Internacia Lenin-pacpremio (Hikmet 1902—63). 72. Dokumenta, per kiu oni difinas kaj disponigas sumon da mono por aparta celo. 74. Tia, ke ĉiuj ĝiaj organoj normale funkcias. 75. GN. 76. Ano de la ĉefgento loĝanta en la lando kies ĉefurbo estas Romo (R). 78. Havenurbo en Malajzio (esp-igita formo). 80. Angla virnomo. 81. *Estona E-verkisto, aŭtoro de novelaro: Auli.* 82. *Rusa E-verkisto, aŭtoro de rakonto: Superforta ambicio.*

**VERTIKALAJ VICOJ:** 1. *Pola E-verkisto, pioniro de Esperanto, verkis eseojn por Literatura Mondo.* 2. *Japana verkisto, poeto, kunlaboranto de pluraj E-revuoj (Masao).* 3. TF. 4. La plej inteligenta vivulo (R). 5. Sola laŭ sia kvalito. 6. Ekzistanta nur en la spirito, ne en la realo. 7. Titolo de ĝentileco, uzata por la viroj (R). 9. NK. 10. Konsonantoj de vorto: garbo. 11. Poezia termino, signifanta: senpera sinsekvo de vokaloj (R). 12. Mezurunuo de tempo (artikolo kaj substantivo). 13. *Japana verkisto, poeto, aŭtoro de poemaro: Invit' al japanesko (Masao).* 15. Infanoj en... romantitolo de la verkisto nomata sub vico 8. horizontala. 17. Moviĝas de loko al loko pasante sentuŝe super la interaĵo. 19. Infanmanĝanta giganto de la fabeloj. 22. La granda rivero de Egiptio. 24. Sennacieca Asocio Tutmonda. 27. Tiel, ke ĝia rando tranĉas. 30. KAA. 32. Plej eta supozita, nevidebla ero de la materio. 35. Enhavanta la tutan kvanton, kiun ĝi entute povas havi. 36. Piedvestaĵojn. 37. OZ. 40. Oksigeno, fosforo kaj karbo. 41. Tubo en animala korpo tra kiu fluas sango. 43. Multajn diskutojn elvokis tiu finaĵo. 44... tero: titolo de la verkisto nomita sub la vico 25. horizontala. 45. Titolo de novelkolekto de la sama verkisto. 47. Rilataj al misteraj fenomenoj. 49. Reen: persona pronomo. 50. Ekscitigo de korporgano, kun kongesto kaj ekŝveligado (R). 51. AAS. 52. Havaĵon de li. 54. *Rusa verkisto, redaktoro kaj inicianto de Enciklopedio de Esperanto.* 56. Peti pri sciigo, informo (R). 58. Prezentas sinsekvajjn ŝanĝigojn. 59. Apartenanta al ĉiuj. 60. Soveta astronauto kiu unua de la mondo paŝis el la kajuto de kosma ŝipo la kosman spacon. 62. Membro de la Hitlera nacionalsocia partio (R). 64. Apartenanta al la kora inklinio. 66. Ano de religia ordeno. 68. Movado kun regula alterno de fortaj kaj malfortaj elementoj (R). 69. Apartenanta al glacidomo de eskimoj. 71. Nedifinita kvanto de materio, kiun oni rigardas kiel tutajon (R). 73. Sekvanta post la sepa. 77. LO. 79. Valora metalo (R).

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 1973/3 estas „EN LUMAJ ONDOJ NAĜAS LA RENASKITAJ PONTOJ, LABOR TRA L' URBO SPIRAS TRIUMFE KAJ FELIĈO!”

*Libropremion gajnis:*

Zdenek Hrsel Botanická 28 60200 BRNO el Ĉeĥoslovakio, Rainer Fischer Block 144/7 409 HALLE-NEUSTADT el DDR, Lászlóné Bognár Kert u. 4. 9024 GYŐR el Hungario.

Kun ĝojo ni konstatas la ĉiam kreskantan interesiĝon pri niaj enigmoj. Ni ricevas amase ĝustajn solvojn. Kun bedaŭro — pro manko de loko — ni devas rezigni pri la publikigo de la nomoj de ĉiuj ĝustajn solvojn sendantaj.

## AL ĈIUJ ESPERANTISTOJ

Kiel oni povis sperti, en la lastaj jaroj ni komencis doni ian indan, interesan karakteron por ĉiuj numeroj de Hungara Vivo. La leteroj, opinioj de niaj legantoj atestas, ke ili akceptis ĉi tiun planon favore, ĉar oni ĉerpadis bone el la numeroj de HV — ekzemple — ĉe klubkunveno, prezentadoj, lingvopraktikado, informado por vojaĝo ktp. Ni rekomendas al ĉiuj esperantistoj:

- 3/1971 — n. pri K. Kalocsay
- 4/1972 — n. pri Literatura Mondo
- 3/1973 — n. pri Budapest
- 4/1973 — n. pri S. Szathmári, verkisto
- 1/1974 — n. pri la originala Esperanto-prozo
- 2/1974 — n. pri Hungario kiel inda turisma celo
- 3/1974 — n. pri la originala Esperanto-poezio
- 4/1974 — n. pri la hungara ekonomia vivo
- 5/1974 — n. pri la originala Esperanto-dramo
- 6/1974 — n. pri la hungara scienco

Redakcio de HV

ABONO DE HUNGARA VIVO EN  
EKSTERLANDO

Peranto al eksterlando: KULTURA Budapest 62. O. BOX. 149.  
Abonpreza por unu jaro (ses numeroj) en Usonaj dolaroj — 5.—

AŬSTRIO: HANDEL, Norregade 6, Ont. M5T 2T8 DÉLIBÁB  
GLOBUS (VAZ) Höch- DK—1165 KOBENHAVN FILM AND RECORDS  
städtpfatz 3. A—1200 K. STUDIO, 19 Prince Ar-  
WIEN XX., FINNLANDO: thur Street, West, MON-  
AŬSTRALIO: AKATEEMINEN KIR- TREAL 130, P.Q.  
C.B.D. Library and JAKAUPPA, Keskus- KOREO:  
Subs. Service, Box 4886., katu 2. SF—00100 HEL- „CHUIL U”, Phenjan  
G.P.O., SYDNEY, NSW SINKI 10. RAUTATIE- NEDERLANDO:  
2001 COSMOS BOOKS- KIRJAKAUPPA OY, UNIVERSALA ESPE-  
HOP, 145 Acland Street, Kampinkatu 2, SF—00100 RANTO ASOCIO, Nie-  
ST. KILDA, 3182 READ HELSINKI 10. uwe Binnenweg 176,  
AND CO. 694—696 FRANCIO: ROTTERDAM 3002  
George Street, SYD- AGENCE LITTERAIRE NORVÉGIO:  
NEY, N.S.W. ET ARTISTIQUE PARI- A/S NARVESENS LIT-  
BELGIO: SIENNE, 23 Rue Royale, TERATURJTJENESTE,  
AGENCE MESSAGERIE PARIS 8. Bertrand Narvesensvei  
DE LA PRESSE, 1 Rue Rue de la Grange Ba- 2, Box 6140, OSLO 6.  
de la Petit-Ile, B—1070 teliere, PARIS IXe. POLLANDO:  
BRUXELLES GERMANA DEMOKRA- B.K.W.Z. RUCH, ul.  
OFFICE INTERNATIO- TIA RESPUBLIKO: Wronia 23, 00—840  
NAL DE LIBRAIRIE ZEITUNGSVERTRIEBS- WARSZAWA  
S.A., Avenue Marnix 30, AMT, Strasse der RUMANIO:  
1050 BRUXELLES Pariser Kommune 3—4. D.E.P. Bucuresti  
BRAZILIO: LIVRARIA D. LANDY 1004 BERLIN D.E.P. Arad  
LTDA. Rua 7 de Abril, GERMANA FEDERA- SOVETUNIO:  
Caixa Postal 7943, 01000 CIA RESPUBLIKO: Pochtamt—Import,  
SAO PAULO VERLAG HANS LEIN- Moszkva  
BRITIO: NITZ, 6 FRANKFURT 1, Pochtamt—Import,  
BRITA ESPERANTISTO Hölderlinstrasse 10. Leningrad  
ASOCIO, 140 Holland W.E. SAARBACH  
Park Ave., LONDON GMBH, P.O.B. 101610, SVEDIO:  
W11 4UF COLLET'S Follerstrasse 2, 5 NORDISKA BOKHAN-  
HOLDINGS LTD., Den- KÖLN 1. DELN, Fack, 101 10  
nington Estate, WEL- ITALIO: STOCKHOLM 1.  
LINGBOROUGH, Nort- LIBRERIA COMMIS- SVISIO:  
hants NN8 2QT SIONARIA SANSONI, AZED AG. Dornacher-  
THE DANUBIA BOOK Via Lamarmora 45, Cas- strasse 60—62. 4000  
COMPANY, 58, Chats- sella Postale, 552, 50121 BASEL  
worth Road, LONDON, FIRENZE METROPOLITAN VER-  
NW2 4DD SO. CO. LIB. RI. Ex- LAG, Teichweg 16.  
BULGARIO: port-Import, Piazza Mar- CH—4142 MÜNCHEN-  
Direkzia REP, 11. pl. gana 33, 00186 ROMA STEIN  
Slaveikov, SOFIA JAPANIO: USONO:  
ČEĤOSLOVAKIO: MARUZEN CO. LTD. FAM BOOK SERVICE,  
MADARSKA KUL- P.O. Box 5050 TOKYO 69 Fifth Avenue, NEW  
TURA, Vaclavské nám 69, N.Y. 10003  
2, 110 00 PRAHA 1. INTERNATIONAL, YORK, N.Y. 10003  
Postova Novinova Sluz- 100—31 JAPAN NAUKA HUNGARIAN BOOKS  
ba — dovoz tisku, Vi- LTD. 2—30—19 Mi- AND RECORDS, 11802  
norhadská 46, PRAHA hima-ku, TOKYO 171 Buckeye Road, CLEVE-  
Postova Novinova JAPAN LAND, Ohio 44120  
Sluzba — dovoz tlace, STECHERT—HAFNER, INC. P.O. Box 600, RI-  
Leningrádska 14, BRA- VERSIDE, N.J. 08075  
TISLAVA VENEZUELO:  
CINIO: LUIS TARCSAY, Cara-  
BEIJING WAIWEN PROSVETA EXPORT— cas, Apartado 50. 892,  
SHUDIAN, Periodical IMPORT, P.O.B. 555, Te- VENEZUELA  
Division, P.O. Box 50, razije 16/1. 11001 BEOG-  
PEKING RAD KANADO: VJETNAMO:  
PEKING POST OFFICE, KANADO: XUNHASABA, Phong  
Branch No. 106, PEKING PANNONIA BOOKS, Phat Hanh Bao Chi, 17  
DANLANDO: P.O. Box 1017, Postal Dinh Le, HANOI, RD  
MUNKSGAARD'S BOG- Station „B” TORONTO, VIETNAM

Hungaroj abonu por eksterlandanoj



Revuo de Hungara Esperanto-Asocio  
1368. Budapest, Hungario,  
Kenyérmező u. 6.  
Aperas dumonate  
XIV. jaro. 1974. 1-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*  
Responda redaktoro:  
*d-ro Jozefo Mátéffy*  
Lingva revizio: *K. Kalocsay*  
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoroaro:  
D-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai,  
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada  
Császár, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy,  
d-ro Lajos Lesznai, Alfonso Pechan,  
Aurél Ponori Thewrewk, Mária Szabó,  
d-ro István Szerdahelyi, Tibor Újlaky-Nagy,  
Gábor Vigh

Cefkunlaborantoj:  
D-ro Géza Bárczi, Paulo Balkányi,  
Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko  
Kökény, Sándor Szathmári, Lajos  
Tárkony

La redakta komitato ĉiun merkredon  
kaj la unuan kaj trian ĵaŭdon de ĉiu  
monato posttagmeze de la dua ĝis  
la kvina horo havas akceptotagon.

Redakcio: Budapest, VIII.  
Kenyérmező utca 6.  
Telefono: 141—078

Eldonas: „Népszava” Gazeteldona  
Entrepeno, Budapest, VII., Rákóczi  
út 54.  
Telefono: 224-819

Responda eldonisto: Márton Gábor  
direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla  
en ĉiuj poŝtoŝtancoj, ĉe la gazetkoltportistoj  
de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto  
(K.H.I. 1900. Budapest. V. József nádor tér 1)  
senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj)  
Ft. 48.—, al eksterlando krome  
Ft 9.60 por afranko.


74. 2363 Dürer Nyomda  
Gyula  
Indexszám: 25.377




## Konsumturist



**Kun riĉa  
sortimento  
de  
artobjektoj  
ni atendas  
vin**



**Niaj varoj  
doganlibere  
estas  
elporteblaj  
el la lando**



ORSZÁGOS VÍZÜGYI HIVATAL  
TUTLANDA OFICEJO PRI AKVOMASTRUMADO

1394 BUDAPEST, FŐ UTCA 48-50.

TELEFON: 152-277, 151-031



TELEX: 22-4879